



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista

Unu n-ro : 8 FF. Abono por 1989 kun adresaro : 40 FF.

Rekte ĝiri al pĉk-numero : 3371 74 M BORDEAUX, profite al :


Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut

NOVA JARO

Ĉu ne estas stulta kutimo, prezenti bondezirojn por la nova jaro ? Unue, tiu dato ne esence diferencas de iu alia ; due, la bondeziroj, kiel ajn sinceraj, estas tute senefikaj; same kiel la preĝoj. Kial do la homoj, eĉ liberigintaj el ĉiaj mistikoj, persiste oferas al tiu tradicio ?

Mi diris : tiu dato ne esence diferencas de iu alia. Sed la jaro, daŭro de la tera rivo-luo ĉirkaŭ la suno, estas natura temporitmo. Oni povas fiksi la komencon de tiu revoluo en kiu ajn tago, kaj efektive la antikvuloj ĝin situigis en iu printempa tago. Kial nun en vintro, proksime de la vintra solstico ? Verŝajne tial, ke (en la norda hemisfero) ĝi preskaŭ koincidas kun la momento, en kiu la tagdaŭro denove ekplilongigās : tiel ĝi alportas al ni kvazaŭ signon pri espero. Ĉu ne tia estas la simbola signifo de la Sanktalucia nokto en Skandinavio ?

Mi diris : la esprimataj deziroj estas sen-



efikaj, kiel la preĝoj. Nu, multaj dikredantoj plene konscias pri la senefikeco de siaj preĝoj, kaj tamen ili preĝas. Ni ĉiuj scias, ke niaj bondeziroj neniel ŝirmos niajn amatojn de eventualaj malfeliĉoj, tamen ni konfuze sentas la bezonon konfirmi al ili, ke ni volus ilin sekurigi kontraŭ ĉiajn danĝerojn, kaj certigi al ili ĉion bonan, almenaŭ por la daŭro de la komenciĝanta jaro. Kvankam konscie senpovaj, ni sincere tion dezirus : do niaj bondeziroj, ja senefikaj, ne estas sensignifaj.

Tial, geamikoj de L!, mi deziras al vi ĉiuj
feliĉan jaron 1989.

VALO.

NI NE MALGAJU

Karaj laŭtuloj, jam decembras. Kaj pri venonta jaro mi pensas. Estu ĝi sukcesoplena por ĉiuj kunlaborantoj de "L!". Kresku abonantaro de nia revueto, laŭtaj voĉoj aŭdiĝu sur ĉiuj kontinentoj. Sanon kaj bonan humoron al ĉiuj !

Donace mi tiris el mia skatolo ŝercan konsilon ciganan. Ĝi helpu nin dum Nova jaro, kaj dum ĉiuj postaj jaroj...

El cigana popolsaĝo

- Ne malgaju! - konsilis cigano al ciganido.

Nur du aferoj povas vin malgajigi : aŭ bone vi vivos, aŭ malbone.

Se bone vi vivos, kial malgaji ?

Sed se malbone, do unu el du : aŭ vi estos sana aŭ malsana.

Se vi estos sana, kial malgaji ?

Se aŭ se vi estos malsana, tiam unu el du : aŭ vi resaniĝos aŭ vi mortos.

Se vi resaniĝos, kial malgaji ?

Sed se vi mortos, tiam unu el du : aŭ ĉielon vi trafos aŭ inferon.

Se ĉielon vi trafos, kial malgaji ?

Sed se inferon... ne malgaju ! Tiom da konatuloj vi devos saluti, ke malgajon vi tute forgesos !

Amike kaj gaje

sojle de 89a jaro

Oksana

E. ARMAND

LA ANTAŬVENANTOJ

DE

ANARKIISMO

Esperantigis D.C.

Antikveco

Ni ne scias ekzakte - kaj kiuj dokumentoj povus nin informi ? - kiam komenciĝis la registara aŭ ŝtata aŭtoritato. Oni atribuis multajn kialojn al la establado de la aŭtoritato. Tial ke la homoj formis ĉiam pli multnombrajn grupojn, ĉu pruviĝis necese konfidi la aferadministradon kaj la solvon de la kontestoj al la plej inteligentaj aŭ la plej timataj : sorĉistoj kaj pastroj ? Tial ke la primitivaj grupoj ĝenerale montriĝis malamikaj unuj kontraŭ la aliaj, ĉu trudiĝis la neceso centralizi la medio-defendon inter la manoj de pluraj aŭ de unu sola elektita inter la militistoj (la militistinoj) plej kuraĝaj aŭ plej bravaj ? Iel ajn estu, ŝajnas ke aŭtoritato ekzistis antaŭ la individua proprieto. Aŭtoritato evidente regis, dum la bienoj, la objektoj kaj, en iuj kazoj, la infanoj kaj la virinoj estis posedaĵo de la socia organizo. La reĝimo de la individua proprieto - t.e. la ebleco por membro de la kolektivo : 1-e akapari pli da grundo ol necese por sin vivteni kun sia familio ; 2-e ekspluatigi la pliaĵon pere de aliulo - nur rafinis, komplikis kaj igis pli tirana la aŭtoritaton ĉu teokratian ĉu esence militistan.

Ĉu la primitivuloj ribelis kontraŭ la aŭtoritato eĉ rudimenta, kiu severis en la primitivaj grupoj ? Ĉu estis obĵetantoj, malobeantoj en tiuj tempoj, kiam la klimataj fenomenoj estis atribuatataj al superaj potencoj jen bonaj jen malfavoraj, kiam oni rilatigis la homokreadon al supernatura ento ? Iuj mitoj montras, ke la homo ne ĉiam bonvole akceptis esti ludilo en la mano de la dieco kaj sklavo de ties reprezentantoj, ekzemple la mito pri Satano kaj Prometeo, ribelaj anĝeloj kaj titanoj. Eĉ pli malfrue, kiam la registara kaj eklezia aŭtoritato estis firme starigita, okazis manifestacioj kiuj, kvankam restantaj en paca kadro, tamen atestis pri ribeleco. Oni povas klasifiki sub tiu ŝildo la satirajn scenojn kaj komediojn, la romanajn saturnaliajn, la kristanan karnavalon, ktp. Multaj fabeloj cirkulis inter la popolo, kiu ilin aŭdis ĉiam kun ĝojo iafaĵe

infaneca, en kiu la temo estis la sama : la venko de la malfortulo, de la subpremado, de la malriĉulo super la tirano aŭ la riĉulo.

La greka antikveco, kun Gorgio neanta ĉiujn dogmismojn ; kun Protagoro faranta la individuon mezuro de ĉiuj aferoj ; kun Aristipo, fondinto de la hedonisma skolo, por kiu ne estas alia bono ol la plezuro, la tuja aktuala plezuro, kio ajn estu ties origino ; kun la cinikuloj (Antisteno, Diogeno kaj Krateso) ; kun la stoikuloj (Zenono, Krizipo kaj ties sekvantoj), la greka antikveco naskis homojn kritikantajn, poste neantajn la ricevitaĵajn valorojn.

Ekde la negado de la valoroj de la helena kulturo, la cinikuloj atingis al la negado de ties institucioj : geedzeco, patrio, proprieto, ŝtato. Malantaŭ la barelo kaj la lanterno de Diogeno, kuŝis io alia ol moko kaj spritvortoj. Sendube Diogeno traboris per siaj pikaj sarkasmoj la plej potencajn kaj la plej timatajn inter tiuj, kiuj elŝiris unuj el la aliaj la restaĵojn de la agonianta Ateno. Sendube Platono, skandalite de la ultrapopulara formo de liaj predikoj, lin nomis "iu delira Sokrato" ; sed rigardante la manlaboron egala al la intelektlaboro, proklamante sin mondcivitanoj, konsiderante la generalojn kiel "azenkondukistojn", igante ridindaj la popularajn superstiĉojn kaj eĉ la demonon de Sokrato, reduktante la vivobjekton al ekzercado kaj disvolvado de la morala persono, la cinikuloj povis sin pretendi, kiel sia mastro, animkuracistoj, heroldoj de libereco kaj vereco. Laŭ socia vidpunkto la cinikuloj estis komunecanoj, kaj tiu ilia principo ampleksis ne nur la aĵojn, sed ankaŭ la personojn, koncepto kara al diversaj filozofoj de la antikveco.

Oni riproĉis al la cinikuloj, kaj aparte al Diogeno, esti orgojlaj pro sia izoleco, pozi kiel modeloj, kaj troigi en sia vivmaniero, kiu estis kvazaŭa negado de ĉia organizita socio. Diogeno jam antaŭe respondis : "Mi estas sama, kiel la ĥorestroj, kiuj forcas la tonon por tiun alprenigi de la lernantoj."

La unua instruo de Zenono, tiu de la "Stoa", multe similis la instruon de la cinikuloj. Zenono, en sia "traktaĵo

pri la Respubliko" forpuŝis la morojn, la leĝojn, la sciencojn, la artojn, samtempe postulante, kiel Platono, la komuneco de la bienoj. La fundo de la stoika sistemo estas, ke la bono de l' homo estas la libereco, kaj ke la liberecon oni konkeras nur per la libereco. Saĝulo estas sinonimo de libera homo : li ŝuldas sian bonon nur al si mem kaj dependas nur de si. Ŝirmita de la sortobatoj, en ĉio sensenta, sin reganta, bezonante nur sin mem, li trovas en si senlimajn serenecon, liberecon, feliĉon. Li ne plu estas homo. Li estas dio kaj pli ol dio, ĉar la feliĉo de la dioj estas privilegio de ties naturo, dum la feliĉo de la saĝulo estas konkero de sia libereco ! Zenono logike neis la ĉiopovecon, la kuratorecon de la ŝtato : la homo estu leĝo al si mem, kaj la individua harmonio naskiĝu el la harmonio kolektiva. Hedonismo, cinikismo kaj stoikismo starigis la "naturan rajton" por la individuo disponi pri si kontraŭ la "artefarita rajto", kiu faras el li instrumenton inter la manoj de la ŝtato. Zenono uzis tiun teorion por kontraŭbatali, kiel jam faris la cinikuloj, la troan naciismon de la Grekoj kaj por allasi socian instinkton, naturan instinkton instigantan la homon asociiĝi al aliaj homoj. Oni povas konsideri la cinikulojn kaj stoikistojn kiel la unuajn internaciistojn.

Mezepoko

Tiu ideo pri "natura rajto", "natura leĝo", "natura religio", estis alprenita de pluraj filozofoj. Cetere la triumfo de l' kristanismo ne estas tiel kompleta, kiel asertas ties incensiloportistoj. Multaj herezuloj tiam stariĝas kaj eĉ, pro singardo, sin kovras per la religia masko kaj trompkasas sian propagandon sub religia ŝelo.

Jen por ekzemplo la gnostikisto Karpokrateso de Aleksandrio, fondinto de la sekto de la Karpokratesanoj, kies filo Epifaneso kunigis la tutan doktrinon en sia verko "Peri Dikaios Inés" (Pri justeco). Laŭ li, la dia justeco en la komuneco ekzistas en la egaleco (Koinonia met' Isotetos). Kiel la suno estas mezurita al neniu, same estu pri ĉiuj aĝoj, ĉiuj ĝuoj. Se Dio donis al ni la deziron, tio estas por ke ni ĝin kontentigu, ne por ĝin restrikti ; same, la aliaj vivantaĵoj ne bremsas sian apetiton.

La Karpokratesanoj estis inter la unuaj, kiuj agnoskis ĉies rajton super ĉiuj aĝoj, ĝis ties ekstremaj konsekvencoj, kaj provis ĝin praktiki. Ili estis laŭŝajne ekstermitaj. Tamen, surskriboj indikas ke, ankoraŭ en la VI-a jarcento, karpokratesaj tendencoj plu ekzistis en Cirenio, en Norda Afriko.

Ekstermitaj aŭ ne, la Karpokratesanoj havis sekvantojn. Ni ne scias, ĉu la inicitoj de la sektoj adoptintaj iliajn konceptojn aŭ similajn ideojn forĵetis, interne de siaj grupoj, ĉian aŭtoritaton, ĉu ili ne estis "organizitaj" laŭ nuntempa stilo. Sed certe estas, ke la politika reĝimo reganta havis en ili nerepacigeblajn kontraŭulojn. Ekzistis internacioj el sekretaj societoj interrilataj, kies membroj, vojaĝante, estis frate akceptataj de la respondaj asocioj. Oni instruadis sekrete, kaj la multaj procesoj kontraŭ tiuj, kiuj estis malkovritaj kaj viktimiĝis de sia propagando, tion sufiĉe demonstras. Tre bedaŭrinde, iliaj veraj opinioj estas de ni nekonataj. Oni parolas nur pri iliaj krimoj (?) aŭ iliaj dekliniĝoj (?).

En la sinodo de Orleano (1022) dek unu kataristoj (Albigensoj) estas bruligitaj, ĉar akuzitaj praktiki la liberan amon. En 1030, en Montforto apud Torino, herezuloj estas akuzitaj, ke ili sin deklaris kontraŭ la religiaj ceremonioj kaj ritoj, ankaŭ kontraŭ la geedzeco, la murdo al animaloj, kaj favoraj al la komuneco de la bienoj. En 1052 en Goslar, ioma nombro de la herezuloj estis bruligitaj pro tio, ke ili sin deklaris kontraŭ la ekmortigo de ĉia vivantaĵo, t.e. kontraŭ la milito, la murdo kaj la ekmortigo de la bestoj. En 1213, Vaŭdanoj estis bruligitaj en Strasburgo pro tio, ke ili predikis liberan amon kaj komunecon de la bienoj. Temis ne pri "kleruloj", sed pri simplaj metiistoj : teksistoj, ŝuistoj, masonistoj, lignaĵistoj, ktp...

Sin apogante sur peco de la epistolo de Sankta Paŭlo al la Galatoj : "Se vi estas kondukataj de la spirito, vi ne plu estas sub la leĝo", multaj sektanoj lokis la homon, la personecon super la leĝo. Viroj kaj virinoj alprenis vidpunkton sufiĉe similan al tiu de la Karpokratesanoj kaj finatingis, en praktiko, al speco de libera komunismo, kiun ili travivis, kiel ili povis, en specoj de

kolonioj pli malpli okultaj kaj sub la minaco de senkompata subpremo. Amaŭro aŭ Amalriko el Bène apud Chartres instruis tiujn ideojn en Sorbono en la XII-a jarcento. Li havis disĉiplojn pli energiajn ol li, inter kiuj Ortliebo-n el Strasburgo ; tiuj konigis lian doktrinon anarki-panteisman en Germanio, kie ili trovis entuziasmajn kaj konvinkitajn partizanojn sub la nomo "Brüder und Schwestern des freien Geistes" (Fratoj kaj Fratinoj de la libera spirito), kiujn Max Beer, en sia "Historio de Socialismo", konsideras kiel anarki-individuistojn, sin tenantajn ekstere de la socio, de ties leĝoj, moroj kaj kutimoj, kaj kiujn kompense, la organizita socio senkompatate kontraŭbatalis.

Iom imagu ! Por Amalriko el Bène kaj sekvantoj, Dio troviĝis en Jesuo samkiel en la paganaj pensuloj kaj poetoj, li parolis per la buŝo de Ovidio, samkiel per tiu de Sankta Aŭgusteno. Tiaj homoj ne indus vivi !

En la herezoj endas distingi inter la panteismo-anarkismo Amalrika, kies anoj sin konsideris eroj de la Sankta Spirito, forĵetante ĉian asketismon, ĉian moralan trudon, situante por tiel diri trans bono kaj malbono, - kaj la heredantoj de la maniĥeana agnostikismo kiel la Albigensoj, asketoj, kies aspiroj celis venkon super la materio. Sed ne ĉiam estas facile vidi la ekzaktan limon inter ili. La katolika historiisto Doellinger, kiu studis la historion de ĉiuj ĉi sektoj, ne hezitis diri ke, se ili estus venkintaj (temis precipe pri la Vaŭdanoj kaj Albigensoj), rezultus de tio ĝenerala renverso kaj kompleta reveno al la paganaj barbareco kaj sendisciplino.

Al la unua grupo panteista-anarkiista ni religas la antverpenan herezon de "Tanchelin", tiun de la "Kloeffers" de Flandrio, de la Pikardoj aŭ Adamuloj (radiantaj ĝis Bohemio), de la "loistoj" ankaŭ antverpenaj ; ĉie starigas homoj aŭ asocioj, kiuj volas reagi kontraŭ la superrega sistemo, reprezentita precipe de la katolikismo, kies alt-ranguloj havis skandalan konduton, plutenis la prostituadon, regis bordelojn kaj ludodomojn, estis armitaj kaj batalis kiel profesiaj militistoj.

Mi absolute samopinias kiel Max Nettlau, laŭ kiu, en la lastaj jaroj de la Mezepoko, Sudfrancio, Albigenslando, parto de Germanio ĝis Bohemio, la regionoj trafluataj de

la malsupra Rejno ĝis Nederlando kaj en Flandrio, iuj partoj de Anglio kaj Italio, fine Katalunio, konsistigis elektan terenon por la sektoj, kiuj atakis la geedzecon, la familion, la proprieton kaj altiris al si senkompatan subpremon.

Ne nur en Eŭropo disvolviĝis anti-aŭtoritataj movadoj. En la historio de Armenio, de Tschamtschiang (Venecio 1795), temas pri iu persa herezulo kun nomo Mduŝik, kiu neis "ĉian leĝon kaj ĉian aŭtoritaton"... La Literatura Suplemento de la "Novaj Tempoj" (Temps Nouveaux, Paris, vol.II, p.556-57) enhavas artikolon titolitan "Unu antaŭvenanto anarkiista", en kiu la turka D-ro Abdullah Djevdet prezentas siran poeton de la XV-a jarcento : Ebr-Ala-el Muarri.

Renesanco

Aliras ni la Renesancon ; ne eblas nei, ke la katolikoj helpataj de la sekulara ŝtato, neniigis kaj reduktis al senpoveco la panteistajn-anarkiistajn herezulojn. La protestantoj ne sin montris indulgaj al la anabaptistoj, speco de aŭtoritataj komunistoj sin apogantaj sur la Malnova Testamento. La diktaturo de Jan de Leyde en Munster fulmrapide pasis. La malnova mondo devis klini la kapon sub la ĉiopoveco de la ŝtato pli forte servata kaj centralizita ol en la Mezepoko. La malkovro de Amalriko tamen flamigis la spiriton de la pensuloj kaj originaluloj, kies mensostato ne estis dispremita sub la laminatilo de la politika organizado. Oni parolis pri feliĉaj insuloj, pri Eldoradoj, Arkaidoj. En sia "Kosmographey" (1544) Sebastian Münster priskribis la loĝantojn de la "novaj insuloj", "kie oni vivas libera je ĉia aŭtoritato, kie oni konas nek la juston nek la maljuston, kie oni ne punas la misfarulojn, kie la gepatroj ne superregas siajn infanojn. Nenia leĝo, libereco de la seksaj rilatoj. Neniu spuro de iu Dio, nek de iu bapto, nek de iu kulto." Al tiuj aspiroj de libereco oni eble ligu la aperon de la Framasonismo kaj de la diferencaj ordenoj el iluminatoj. Unu el la plej brilaj genoj de la Renesanco, Francisko Rabelezo kun sia Abatejo de Thélème (Gargantuo I. 52/57) povas esti egale konsiderata kiel unu el la antaŭvenantoj de anarkismo. Elizeo Reclus lin proklamis "nia granda praulo". Certe en la priskribo de tiu libereca medio, li neglektis la ekono-

mian flankon kaj li inklinis al sia jarcento pli ol li imagis mem. Certe, sian rafinitan biendomon li pentris kun la sama spirito, kiel Tomaso More, en sia "Utopio", sian idealigitan Anglion, kaj kiel Campanella, en sia "Civito de l' Suno", sian italan kaj teokratian respublikon, aŭ kiel la aŭtoro de "Reĝlando de Antangil" (la unua franca utopio, 1516) sian protestantan konstitucion monarkion. Tio ne malhelpas, ke plaĉis al Rabelezo, en la Abatejo de Thélème, pentri vivon **senaŭtoritatan**. Oni memoras, ke Gargantuo ne volis konstrui "muregojn ĉe la ĉirkaŭo". "Eĉ, kaj ne sen kaŭzo, aprobis la monako, kie muro estas antaŭ kaj malantaŭ, estas multe da murmuro, envio kaj muta konspiro"... La du seksoj ne sin tenis senmove kaj senparole... "tiela simpatio estis inter viroj kaj virinoj, ke ĉiutage ili estis vestitaj per simila ornamaĵo..."

"Ilia tuta vivo estis okupita ne per leĝoj, statutoj aŭ reguloj, sed laŭ ilia bonvolo aŭ libera arbitro ; ili ellitiĝis, kiam plaĉis al ili ; ili trinkis, manĝis, laboris, dormis, kiam ili sentis por tio deziron. Neniu ilin vekis, neniu perforte devigis ilin trinki, manĝi, aŭ fari ion ajn. Tiel establis la aferon Gargantuo. Kaj ilia regulo estis nur tiu klaŭzo : "faru kion ĉi volas", ĉar liberaj homoj, bone naskitaj, bone instruitaj, konversaciante kun honestaj kompanoj, nature havas instinkton kaj pikilon, kiuj puŝas ilin al virtaj faroj, kaj fortiras de malvirto, kiun ili nomis honoro. Tiuj, kiam pro triviala regateco kaj trudado, estas deprimataj kaj submetitaj, deturnas la noblan inklinton per kiu ili sincere emis al virtoj, kaj demetis kaj forĵetis tiun servutecan jugon : ĉar ni ĉiam entreprenas malpermesitajn aferojn, kaj avidas tion, kio estas al ni rifuzita... Per tiu libereco, ili eniĝis en laŭdindan konkuremon por fari ĉion, kio plaĉis al unu sola. Se iu diris : "Ni trinku", ĉiuj trinkis, se diris : "Ni ludu", ĉiuj ludis. Se diris : "Ni iru al kampaj petoloj", ĉiuj tien iris..."

Rabelezo estis pliverdire utopiano. Alia antaŭanto - kaj fama - de anarkio estas nekontraŭdireble La Boétie (La Boesi) en sia "Kontraŭ unu" aŭ "Pri memvola servuto" (1577), kies ĉefa ideo estas la rifuzo kontraŭmetenda al la servo de l' tirano, kies potenco fontas el la memvola servuto de la homoj. "Eliĝante el eta fajrero, la fajro altiĝas kaj des pli vigliĝas, ju pli ĝi trovas lignon. Por

estingi ĝin, ne necesas ĵeti akvon, sufiĉas, ke oni ne plu metu lignon ; tiam, disponante nenion konsumotan, ĝi konsumiĝas, perdas sian tutan vigecon kaj ne plu estas fajro. Same pri la tiranoj : ju pli oni donas kaj servas al ili, des pli ili gajnas novajn fortojn por ĉion neniigi kaj detrui. Male, se oni nenion donas al ili, se oni ne obeas ilin, sen bato, sen batalo, ili restas nudaj kaj venkitaj, kaj neniĝas ; samkiel radiko, kiu sen suko, sen nutraĵo, sekigiĝas kaj mortas." "Firme decidu ne plu servuti, kaj jen vi liberaj."

La Boesi ne rekomendas socian organizadon difinitan. Tamen li parolas pri la naturo, kiu faris ĉiujn homojn samforme kaj laŭŝajne sammuldile... "ĝi ne sendis tien la plej fortajn nek la plej prudentajn kiel armitajn rabistojn en arbaron por malmilde trakti la malfortulojn. Prefere kredu, ke, atribuante pli al unuj, malpli al aliaj, ĝi celis instigi al frata amo inter unuj helpokapablaj kaj aliaj helpobezonantaj. Se do tiu bona patrino donis al ni ĉiuj la tutan terglobon kiel loĝejon, loĝigis nin ĉiujn en iel sama domo, kreis nin ĉiujn el sama pasto por ke ĉiu povu sin rigardi, preskaŭ rekoni en la alia kvazaŭ en spegulo ; - se ĝi donis al ni ĉiuj komune tiun altvalorajn, la voĉon, la parolkapablon, por ke ni pli interrilatu kaj interfratiĝu, por ke la reciproka eldirado de niaj pensoj konduku al komuna volo ; - se ĝi ĉiel strebadis tiel forte streĉi la kunligon de nia socio kaj alianco ; - se ĝi ĉiel evidentigis sian volon fari nin ĉiujn ne ligitaj, sed unu ; - ni ne dubu, ke ni estas nature liberaj, ĉar ni estas kunuloj ; kiu do povus imagi, ke Naturo, kuniginte nin ĉiujn, servutigu iun ?" El tio oni povus dedukti tutan socian sistemon. (*)

(*) La citaĵoj de La Boesi estas elliritaj el la traduko de ROL (Memvola Servuto).

Modernaj Tempo

La monarkio fariĝas pli kaj pli absoluta. Ludoviko la XIV-a reduktas la duonon de la "intelektulo" al stato de servisteco, kaj devigas la alian duonon sin turni al la nederlandaj presejoj. En "La sopiroj de la sklaveca Francio, kiu aspiras al libereco" (1689-1690) kaj similaj verkoj aperintaj en Amsterdamo, oni trovas malmulte da anarkiismo. Oni devas atendi Dideroton por audi tiun frazon, kiu sufiĉas por esprimi la tutan anarkiismon: "Mi volas nek doni nek ricevi leĝojn." En sia interparolo de patro kun siaj infanoj (Kompleta Verkaro, vol.V, p.301) li donis antaŭecon al la homo de l' naturo super la homo de l'leĝo, al la homa racio super tiu de la leĝodonanto. Ĉiuj memoras la frazon de la Marŝalino en "Interparolo de Filozofo kun la Marŝalino": "La malbono estas tio, kio havas pli da damaĝoj ol da avantaĝoj; la bono, male, kio havas pli da avantaĝoj ol da damaĝoj." Kaj la adiaŭoj de la maljunulo en la "Suplemento al la vojaĝo de Bougainville": "Vi estas du infanoj de l' naturo: kiun rajton ci havas super li, kiun li ne havas super ci?" - Stirner, pli poste, ne parolos pli ĝuste.

En la "Socialista Revuo" de septembro 1888, Benoît Malon dediĉas dekon da paĝoj al Don Deschamps, benedik-tano de la XVIII-a jarcento, antaŭvenanto de la Hegelismo, Transformismo kaj anarkiisma komunismo.

Jen fine Sylvain Maréchal, poeto, verkisto, bibliotekisto (1750-1803), kiu la unua ĝoje proklamis anarkiismajn ideojn, tamen makulitajn de arkadiismo: Sylvain Maréchal estis poliverkisto, kiu traktis ĉiuspecajn studobjektojn: "Safisto-poemoj-n" (1770) kaj "Anakreonaj-n kantoj-n" en 1779; li sukcesas aperigi pecojn el "Morala Poemo pri Dio", "La Moderna Pibrac", en 1781; en 1782 "La ora tempaĝo", paŝtista fabelaro; en 1784 "Libro eskapinta el diluvo" aŭ "Psalmoj freŝdate malkovritaj". En 1788, subbibliotekisto, ĉe la Mazarina Biblioteko, li publikigas sian "Almanako-n de la Honestuloj", en kiu li anstataŭigis la nomojn de la sanktuloj per tiuj de famaj viroj kaj virinoj: li lokis Jesuon Kriston inter Epikuro kaj Ninon de Lenclos. Tial, tiu almanako estis kondamnita al bruligo per la mano de la ekzekutisto, kaj ĝia aŭtoro enkarcerigita en Sankta-

Lazaro (*), kie li restadis kvar monatojn. En 1788 aperas liaj "Modernaj apologoj por la Kronprinco". En ili troviĝas la historio de reĝo, kiu, sekve de kataklismo, resendadas hejmen ĉiun el siaj submetitoj, ordonante ke, de nun, ĉiu familiestro estu reĝo en sia hejmo. En tiu verko estas formulita la principo pri "ĝenerala striko" kiel rimedo por starigi socion, en kiu la Tero estos komuna posedaĵo de ĉiuj siaj loĝantoj, kie regas "libereco, egaleco, paco kaj senpekeco". En "La triumfanta tirano" li imagas popolon, kiu cedas la urbojn al la soldatobando kaj rifuĝas en la montaro kie, dividita en familiojn, ĝi vivos sen alia mastro ol la naturo, sen alia reĝo ol siaj patriarkoj, por ĉiam rezignante la restadon en la civitoj de ĝi koste konstruitaj, kies ĉiu ŝtono estis priverŝita de ĝiaj larmoj, kolorigita de ĝia sango. La soldatoj senditaj por rekonduki la homojn en ties domaregojn konvertiĝas al libereco, kaj restas kun tiuj, kiujn ili devis denove servuti, resendadas siajn uniformojn al la tirano, kiu mortas pro furiozo kaj malsato, vorante sin mem. Tio nekontraŭdir-eble estas rememoro de "Memvola Servuto".

En 1790, li eldonas "Almanako-n de la honestaj virinoj" ornamitan per satira gravuraĵo pri la dukino de Polignac. Troigante la "Almanako-n de la honestuloj", li anstataŭigas ĉiun sanktulon per konata virino. Tiuj famaj virinoj estas dividitaj en 12 klasojn laŭ sia "ĝenro" (1 klaso por 1 monato): Januaro, Lesbaninoj; Februaro, Traktistinoj, ktp... (...) Tiun tre raran broŝuron oni trovas nur en la infero de la Nacia Biblioteko.

Sylvain Maréchal nur kun rezervo akceptis la revolucion de 1789. La unua anarkiista franca gazeto "La homamanto" (1841) asertas, ke li diris ke, tiom longe dum ekzistos mastroj kaj sklavoj, malriĉuloj kaj riĉuloj, estos nek libereco nek egaleco.

Sylvain Maréchal pluaperigas siajn verkojn: en 1791, "Damo Naturo antaŭ la Nacia Asembleo"; en la jaro II-a "La lasta juĝo de la reĝoj"; en 1794, "la festo de la racio". Li kunlaboras en "Revolucioj de Parizo"; "La Amiko de la Revolucio", "Bulteno de la Amikoj de Vero". La

(*) Prizonito en Francio.

hebertisto Chaumette, lia amiko, viktimiĝas de la Teroro, sed Sylvain Maréchal eskapas al Robespierre ; li same eskapas al la termodora reakcio kaj al la persekutoj de la Direktorio, kvankam li kunlaboris en la "Manifesto de la Egaluloj", oni almenaŭ asertas tion.

Kiam finita la ŝtormego, Maréchal reprenas la plumon. En 1798 aperas lia "Kulto kaj leĝoj de socio el homoj sen Dio". En 1799, "La vojaĝoj de Pitagoro" en ses volumoj. En 1800, lia granda verko "Vortaro de la malnovaj kaj modernaj Ateistoj", kies suplementon verkis astronomo Jérôme Lalande. Fine, en 1807, "Pri la Virto", postmorta verko, kiu estis eble presita, sed ne aperis, kaj kiun Lalande uzis por la dua suplemento al la "Vortaro de la Ateistoj". Cetere, Napoleono malpermesis al la fama astronomo pli longtempe pluskribi pri ateismo.

*
* *

En Anglio, oni povas ĝis ia grado konsideri Winstanley kaj ties nivelistojn kiel antaŭvenantojn de anarkiismo. John Lilburne, alia nivelisto, denunciis aŭtoritaton "sub ĉiuj ĝiaj formoj kaj aspektoj" ; ne plu estis kalkuleblaj liaj kondamnoj al monpunoj kaj jaroj da prizono. Oni lin ekzilis en Nederlando. Tri fojojn la juĝantaro lin absolvis, lastfoje en 1613 (li estis malobservinta la elpeljuĝon), Cromvelo lin plutenis en kaptiteco "por la bono de la lando" ; en 1656 oni liberigis lin fariĝintan kvakeron, kio ne malhelpis, ke, en 1657, 39-jara, li mortis pro rapidevolua ftizo.

Ĉirkaŭ 1650, oni parolas pri Roger Williams, kiu debutis kiel guberniestro de la teritorio, kiu pli poste formis la Ŝtaton de Rod-Insulo (Usono), kaj precipe pri unu el liaj partizanoj, William Harris, kiu tondre parolis kontraŭ la senmoraleco de ĉiuj teraj povoj, kaj la krimo de ĉiuj punkorektoj. Ĉu temas pri mistika viziulo aŭ pri izolita anarkiisto ? La unuaj kvakeroj estis ankaŭ firme kontraŭŝtataj.

La Nederlandano Peter Cornelius Hockboy (1658), la Anglo John Bellers (1695), la Skoto Robert Wallace (1761) sin deklaras por memvola kaj kooperanta socialismo. En siaj "Prospects" Robert Wallace konceptis homaron kon-

sistantan el multaj aŭtonomaj distriktoj. La protesto kontraŭ la registaraj kaj aŭtoritataj eksceso aperas en ĉiuj specaj pamfletoj kaj satiroj akregaj kaj malkaŝemaj, pri kiuj oni hodiaŭ ne plu havas ekzemplojn. Sufiĉas citi la nomojn de Thomas Hobbes, John Toland, John Wilkes, Swift, De Foe.

Ni parolu nun pri la Irlandano Edmond Burke kaj ties "Vindication of Natural Society" (1756) - pravigo de la natura socio - kies fundamenta ideo estas jena : ia ajn estu la formo de registaro, neniu estas pli bona ol alia. "La diversaj specoj de registaroj reciproke rivalas koncerne la absurdecon de iliaj konstitucioj kaj la subpremon, kiun ili suferigas al siaj regatoj... Eĉ la liberaj registaroj spertis pli da konfuzo kaj kulpis pli da nekontesteble tiranaj agoj ol la plej despotaj registaroj en la historio." Edmond Burke ŝanĝis siajn dirojn. En siaj "Pripensoj" li stariĝis kontraŭ la franca Revolucio. Iu Usonano, Paine, deputito ĉe la Konvencio, respondis al li per "The Rights of Man" (1791-92) - la rajtoj de l'Homo. Ĉar li oponis al la ekzekuto de Ludoviko la XVI-a, li estis forĵetita en prizono. Li malfacile eskapis la gilotinon. Li profitis sian restadon en karcero por verki "La prudenta Tempaĝo" - The Age of Reason (1795). "Je ĉiuj ŝtupoj la socio estas bonaĵo, sed eĉ sub sia plej bona aspekto, la registaro estas nur necesa malbono ; sub sia plej malbona aspekto ĝi estas netolerebla malbono... La metio de registaro ĉiam estis monopoligita de la plej nesciantaj kaj plej friponaj el la individuoj de la homaro." En 1796, aperas en Oksfordo broŝuro titolita : "The inherent Evils of all State Government demonstrated" - "Demonstro de la malbonoj esence propraj al ĉia ŝtata registaro", - atribuita al A.C. Cuddon, forte individuism-anarkiema, kiun Benj. R. Tucker reeldonis en 1885 en Bostono.

Sub influo de la Revolucio kreiĝis en Londono grupo nomita "Pantisocracy", impulsita de juna poeto Southey, kiu pli poste laŭ ekzemplo de Burke forneis siajn junecajn revojn. Laŭ Sylvain Maréchal - parte konfirmita de Lordo Bajrono - tiu epikura grupo volis realigi la abatejon de Thélème, kaj komunigi inter siaj membroj ĉiujn aferojn, eĉ la seksajn ĝuojn. Ĉiam laŭ Maréchal, la plej grandaj artistoj, la plej grandaj scienculoj, la plej famaj homoj en

Anglio, estis membroj de tiu grupo, kiu fine estis disigita per unu "Bill" de la Parlamento ("Vortaro de la Ateistoj", ĉe la vorto : Thélème).

En siaj "Figuroj de Anglio" Manuel Devaldès prezentas "La Pantisokratio kiel projekton de kolonio establota en Usono inter la Ilinojsanoj, kolonio bazata sur la ekonomia egaleco. Du horoj da ĉiutaga laboro devus sufiĉi por la nutrado kaj vivteno de la kolonianoj. Laŭŝajne, sekve de la forlaso de Southey kaj la morto de du el la precipaj iniciatintoj, la "Pantisokratio" laŭdire mortis antaŭ ol naskiĝi.

En Germanio, Šillero verkis "La Rabistoj-n", kies ĉefa rolulo, Karl Moor, stariĝis kontraŭ la konvencioj, kontraŭ la leĝo, kiu neniam kreis superan homon, dum la libereco generis kolosojn kaj supervalorajn homojn. Fichte diris ke, se la homaro estus morale perfekta, ĝi ne bezonus ŝtaton ; Wilhelm de Humboldt, en 1792, defendis la tezon de la redukto de la ŝtato al ties minimuma funkcio ; Alfieri en Italio verkis "Pri la Tiraneco".

Ĉiuflanke, sub formo aŭ alia, la aŭtoritato estis senĉese atakata. Spinozo, Comenius, Vico, Voltero, Lessing, Herder, Condorcet, estis liberecanoj laŭ iaj punktoj, iaj formoj de sia literatura aktiveco. Batalante kontraŭ la torturoj puntruditaj al la sorĉistoj, kontraŭ la severegaj punkorektadoj de la deliktoj, kontraŭ la sklaveco - por la liberigo de la virino - por alia edukado de la infano - kontraŭ la religia superstiĉo kaj por la materiismo : Spee, Thomasius, Beccaria, Sonnenfelds, John Howard, Clarkson, Mary Wollstonecraft, Rousseau, Pestalozzi, La Mettrie, d'Holbach, subfosis la subtenilojn de la aŭtoritato. Necesus unu volumo por rememorigi la nomojn de tiuj, kiuj, iel aŭ aliel, kontribuis al ŝancelado de la fido al la Ŝtato kaj Eklezio.

Tial ni finos per William Godwin, kiun, pro lia "Enketo pri la politika justico kaj ties influo sur la virto kaj la feliĉo ĝenerale" (1793), ni konsideras kiel la unuan inda je la nomo doktrinulo pri anarkiismo. Estas ja vere, ke Godwin estas komunist-anarkiista, sed lia neado de la leĝo kaj ŝtato konvenas al ĉiuj nuancoj de anarkiismo.

El "Kio estas Anarkiisto?"

de E. Armand

... Oni kutime ligas historie la anarkion al la laborista movado, kiu sub nomo Internacio floradis fine de la reĝado de Napoleono la III-a. Tio malĝustas. La malamon kaj la insultojn, per kiuj Karlo Marks, la granda profeto de l' scienca socialismo, persekutadis Mikaelon Bakunin, ne kaŭzis profundaj malakordoj intelektaj aŭ etikaj. Bakunin kaj ties amikoj estis forpelitaj de la Internacio, ĉar federalistoj, malcentralizemaj, insurekciemaj, malamikaj al la formo de ŝtatisma konkero por la parlamentaj seĝoj, kiun estis alprenonta la socialista agado. La amikoj de Bakunin, la federalistoj, proklamis sin kolektivistoj kaj iuj inter ili hodiaŭ riproĉas al la socialismo, ke ĝi akaparais tiun kvalifikon ; ja federalistoj tradukis kaj disvastigis en la mediteraneaj landoj "la **Kapitalo**"-n, la ĉefan verkon de Marks. Certe, Bakunin estis anarkiemulo, ofte perforte kaj foje profunde, sed se oni zorge studas la movadon de la ŝurasa federacio (kaj foras de ni la penso mistaksi la agadon, kiun ĝi siatempe plenumis), oni en ĝi renkontos ĉiujn reaperojn de la iama socialismo : kredo je la egaleco, la frateco inter ĉiuj homoj ; ideoj pri universalaj solidaro kaj amo, pri estonta socio, pri revolucio savonta kaj tuj transformonta la homaron - konceptoj, kiujn la anarkiismo, kiel la aliajn, submetiĝas al la individua analizo kaj kiuj estas neniel specife anarkiismaj. Verdire, la federalistoj de la Internacio montriĝis anarkiemaj en la koncepto pri la taktiko kaj la organizado de la socialisma movado. Por la cetero, nenio diferencigis ilin de la tiamaj revoluciaj socialistoj.

Situante ekstere, eksterpartiaj, specoj de perditaj infanoj, vivantaj antitezoj de l' socialismo, la anarkiistoj malakordas sur ĉiuj punktoj kun la nuna socio. (...)

Ĉar ĝi lokiĝas trans la kutimaj reguloj, trans la aŭtoritatoj, kiuj ilin regas, la anarkiismo ne estas nura doktrino, nura sinteno, ĝi estas **vivo**. Ĝi ne estas sistemo, kolekto el preskriboj, malfekunda filozofio, ĝi estas konstanta aplikado, realigado, **aktivado** ĉiutaga !

La anarkiisto negas la leĝon, stariĝas kontraŭ la aŭtoritato de ties reprezentantoj, kontraŭ la agoj de la plenumantoj de la socio, tial ĉar li asertas kapabli doni mem leĝon al si kaj trovi en si la forton necesan por ekzisti kaj konduti, tio sen ekstera interveno, ankaŭ sen kompromitiĝo. Li konceptas neniujn aliajn societojn, ol asociojn el kamaradoj unuiĝintaj per komuna akordo kaj libera laboro. La societoj, en kiuj li vivas, bezonas, por pludaŭri, mil specojn de aŭtoritatoj : aŭtoritato de

dio, aŭtoritato de leĝdonantoj, aŭtoritato de la riĉeco, de la konsiderindeco, de la respekto, de la prapatroj, de ĉiuspecaj programoj. La anarkiisto, elvokante sin mem, ekzamenas, konsideras ĉiujn aferojn, akceptas aŭ forĵetas laŭ tio, ĉu la proponataj aŭ prezentataj ideoj kongruas aŭ ne kun lia vivkoncepto aŭ kun liaj individuaj aspiroj. Ĉiuj homoj akceptas esti determinataj de sia medio ; strebas la anarkiisto - kalkulante kun la neeviteblaj fizikaj kondiĉoj - unue sin determini mem, poste roli kiel **determinanto** de l' medio.

Konklude, la anarkiistoj prezentas al si :

a) homan idealon : la **anarkiiston** ; la homaran unuecon neganta la aŭtoritaton kaj ties ekonomian korolarion : la ekspluatadon ; la estulon, kies vivo konsistas el daŭra reagado kontraŭ medio, kiu nek povas nek volas lin kompreni aŭ lin aprobi, tial ĉar la konsistigaj eroj de tiu medio estas sklavo de malklereco, de apatio, de prapatraj difektoj, de la respekto al la establitaj aferoj ;

b) moralan idealon : la **konscian individuon**, emancipiĝontan, sur la vojo al realigado de nova tipo : la homo sen dioj kaj sen mastroj, sen fido kaj sen leĝo, kiu sentas neniam bezonon pri reglamentado aŭ ekstera trudo, tial ĉar li posedas sufiĉe da volkapablo por determini siajn proprajn bezonojn, uzi siajn pasiojn por pli disvolviĝi, multigi la eksperimentojn de sia vivo kaj konservi sian individuon ekvilibron ;

c) socialan idealon : la **anarkiistan medion**, socion, en kiu la homoj - izolitaj aŭ asociitaj - determinus sian individuon vivon, en siaj aspektoj intelekta, etika, ekonomia, per libere interkonsentita kaj aplikata akordo, bazita sur "reciprokeco", atentante pri la libero de ĉiuj, bridante la liberon de neniu.

(trad. Kribo)

De E. ARMAND, ĉe SAT-Broŝurservo :

**Nia individuismo,
ĝiaj depostuloj kaj tezoj
per demandoj kaj respondoj**

(esperantigis D.C.)

24 paĝoj, 4 FF



KOMERCAJ APLIKOJ DE ESPERANTO

Patriko enkondukas :

Nia movado, aŭ niaj movadoj, alkiutimiĝis al sintenoj, kiujn ni nomas propagandistaj ; ĉu poresperanta, celante la varbadon de pli kaj pli da esperantistoj ; ĉu peresperanta, uzante nian internacian lingvon por varbado profite al aliaj ideologioj kaj religioj...

Oni povas kredi, ke en pli-malpli dista estonteco Esperanto fariĝos vere internacia kaj komuna lingvo parolata de la plimulto se ne de ĉiuj, sed tio estas ja kredo kaj tute ne konsidero de la realo nuntempa.

La realo diras al ni, ke la esperantistoj konsistigas nur malgrandetan malplimulton de homoj, margenan kaj sektaspektan, kaj ke la plimulto de la homoj, ĉu bone aŭ malbone informata, tute ne emas al esperantistiĝo. Ne ekzistas fataleco al esperantistiĝo kaj tio malesperigas kaj endanĝerigas la esp-istan movadon, kiu misjuĝante ilin, tendencas al siniluziĝo kaj totalismo...

Sed pli bone ol propagandi pri nia lingvo kaj ties kvalitoj, ni klopodu pruvi kaj provi ilin praktika kaj utila aplikado. Utila, tio estas antaŭe kaj ĉefe al la neesperantistoj, al ĉiuj ajn normalaj homoj, kiuj nature iĝos nia klientaro.

Ni konsistigas nekonkurenceblan tutmondan reton da samlingvanoj, kiuj ankaŭ perfekte mastras la gepatrajn naciajn lingvojn, kaj kiuj tutcerte kompetentas pri diversaj pliaj fakoj. Ni do, ekipitaj de la plej aktualaj teknikoj, kapablas proponi al la publiko diversspecajn servojn,

nia debato

ricevante la justan pagon, kiu ebligos nian vivteniĝon.

Jen kelkaj proponoj, kiuj laŭ ĉies inventemo estas pligendaj :

- Tradukado de libroj, kiuj estas eldonitaj en nur etajn lingvojn kaj tradukataj en nur unu saman pontlingvon (ĝenerale la anglan).

- Tradukado dum internaciaj konferencoj kaj kongresoj. Eldonado de raportoj en ĉiujn lingvojn.

- Kolektado de informaĵoj pere de gazetara agentejo.

- Starigo de turismaj servoj.

Ĉu tio ne estos plej trafa kaj inteligenta propagando ?

Oksana :

KONI GUSTOJN KAJ BEZONOJN

Konsentite : esperantistoj konsistigas nur etan malplimulton de l'homaro kaj ofte dediĉas tutan sian energion por propagando (bedaŭrinde, inter viglegaj varbantoj ne malmultas eternaj komencantoj). Mi ne neas neceson propagandi. Malplaĉas al mi "nuda propagando" : laŭtaj frazoj, entuziasmaj ekkrioj : "nia lingvo estas bela!" (ĉiu gepatra lingvo estas bela por siaj uzantoj), "nia lingvo estas la plej simpla!" ktp. Ankaŭ ne valoras, laŭ mi, meti reklamojn pri Esperanto (kontraŭ grandega sumo!) en naciajn reklamrevuojn. Bonaj faroj parolas pri si mem kaj kreas senpagan reklamon. Sukcese organizita konferenco kun enhavriĉaj prelegoj, interesa pupteatra festivalo, bele eldonita libro - jen konkretaj ekzemploj de faroj, kiuj vekas scivolemon de eksteruloj kaj faras bonan reklamon por Esperanto kaj ĝiaj uzantoj.

Mi tute ne kompetentas pri komerco. Multajn demandojn mi ne scipovas respondi. Ekzemple : kial libroj de eldonejo A.Iltis tiom terure kostas. Sed mi ĝojas, ke tiu eldonejo eldonis verkojn de Karolo Piĉ, eĉ se mi konscias ke por plimulto da esperantistoj tiuj libroj estas nealireblaj (ne nur pro lingvaj strangaĵoj, sed - komence - pro neeblo aĉeti!)

Mirigis min difino de Patriko pri "utila aplikado". Kial "antaŭe kaj ĉefe al la esperantistoj"? Ĉu eble ĉiuj esperantistoj jam posedas tion kion ili bezonas, sopiras havi?

Lernolibrojn, PIV-on, "Esperantan Antologion" ktp. Tute ne. Ĉu necesas fondi novajn eldonejojn, novajn turismajn servojn ktp.? Laŭ mi, l'ekzistantaj jam sufiĉas - pli bone helpi ilin agi pli efike. Ekzemple, centoj da sovetaj esperantistoj revas pri PIV kaj multaj aliaj libroj, eldonitaj en Okcidento. Kiamaniere havigi ilin, kiamaniere aranĝi disvendadon de jam ekzistantaj libroj - jen urĝa demando por niaj inventemaj komercistoj en novaj kondiĉoj de Glasnost kaj Perestrojka en Sovetio. Ĉu oni pensas pri tio?

Ĉu ni konas bezonojn de niaj samideanoj en diversaj landoj? Eble necesas pridiskuti la temon en tia sinsekvo : bezonoj - ebloj - konkretaj solvoj...? Laŭ miaj primitivaj scioj pri komercaferoj, antaŭ ol entrepreni ion gravan oni profunde studas bezonojn de eventuala klientaro. Por ne esti tro teoria, mi indikos miajn proprajn bezonojn, konsciante ke ne ĉiuj esperantistoj havas la samajn. Kion mi persone volus, kaj kion nia komunuma merkato dume ne proponas (aŭ proponas nesufiĉe) :

- 1. filozofiajn verkojn en Esperanto ;*
- 2. Enciklopedian filozofian vortaron ;*
- 3. belajn konsultlibrojn (kun ilustraĵoj!) pri : bestoj, floroj, papilioj, pentroarto...*
- 4. dikan ĉiumonatan literaturan revuon, en kiu oni povus trovi multpaĝajn eseojn, novelojn ktp.*
- 5. dikan ĉiumonatan historiistan revuon - kun artikoloj ne nur pri historio de Esperanto, sed pri la plej diversaj historiaj eventoj ;*
- 6. "Semajnon" (ne "Monaton!") - dikan politikan revuon kun freŝdataj informoj - nuna "Monato"! ja estis planita kiel semajna revuo... sed - mankis kaj daŭre mankas abonantoj!*
- 7. originalajn verkojn en Esperanto - altkvalitajn kiel ekz. "Ombro sur interna pejzaĝo" de Spomenka Stimec aŭ "Karusejoj" de Sara Larbar.*

Aliaj eble diros : pli da libroj por infanoj, pli da insignoj, T-ĉemizoj, diskoj, kasedoj, bildkartoj ktp.

Pri tradukado. Mi persone volonte tradukus multajn librojn, tio estas mia profesio. Sed - kiom da libroj dumjare aĉetas/legas averaĝa esperantisto? Kiu esploris tion? Kiajn varojn vi bezonas, esperantistoj?

GAROLO :

INTER LA LANGAJ PAPILOJ KAJ LA CERBAJ ĈELOJ

Nekredeble, sed la "gustoj kaj bezonoj" de la homo, la "komercaj aplikoj de Esperanto" kaj la tuta Esperanto-movado mem situigas inter la funkciadoj aŭ ne de la langaj papiloj kaj de la cerbaj ĉeloj.

La cerbaj ĉeloj estas multe malpli sentemaj ol la langaj papiloj... kaj Esperanto ne havas efikon sur ĉi lastajn : la papilojn kaj mukozojn de l'homo. Pro tio Esperanto, kun ĉiuj "internaj ideoj" kaj sektoj religiaj, socipolitikaj, filozofiaj kunligitaj, malrapide antaŭeniras. Tial ke Esperanto mem ne provokas apartajn sensacojn ĉe niaj sensoroj, ĝi malfacile aplikigas en komerco, Esperanto ne taŭgas por konsumismo. Pro la sama motivo, la esperantista popolo estas la plej malriĉa (komprenu : malpli monhava) popolo de la mondo. Kiu avidas je mono (do celas komerci, spekulon, ludon, ks), tiu tute ne pensas pri Esperanto kiel profita instrumento, la hegemonio ja apartenas al la uson-angla lingvo.

Konsekvence la elituloj, intelektuloj, kiel Oksana, kiuj ja uzas siajn cerbajn ĉelojn de 1 al 7, tute ne sukcesos satigi sin per la proponitaj komercaĵoj ĉar, eĉ se oni povus ilin produkti, ja la intelektuloj ne kapablos havi la necesan aĉetpovon. En nia mondo de l'negocoj (komercaj aplikoj en kaj per Esperanto), neniu entreprenema esperantisto sukcesas dece vivteni per la negoco mem : pensu ni pri pri eldonejoj kiel Fonto, pri - ĝuste - **Monato**, kie nia amiko S. Maul laboras praktike sola kaj post normala, profesia deĵorado ; kaj ĉu Kribo lukras per **Laŭte!** ? Kaj ni parolas, de 1 al 7, nur pri eldonado.

Laŭ mia scio ĉiuj turismaj servoj private iniciatitaj pere de Esperanto fiaskis kaj bankrotis. Eltenas, jes, la ŝtataj, kiuj ricevas subvenciojn, kiel en Polio. Eltenas **El Popola Ĉinio**, kie, kontraste al **Monato**, 60 oficistoj pagitaj de la ŝtato laboras (informo donita dum la Pekina Kongreso). Kaj ĉar Oksana citas Spomenka Stimec, ties entreprenoj pri teatro, k.a. ankaŭ postvivas danke al la helpo de la Jugoslava ŝtato. Pri la **Karuseloj**... de Sara Larbar, kiun mi aparte bone konas ĉar laŭ la sugesto de Patriko mi helpis al inteligenta propagando, la entrepreno pri filmado, kiu vivigas Esperanton en la roloj de ĉarmaj Silvana, aŭ Rok-sana, aŭ Janaina, k.a. restis en la fikcio de l'romano !

Kiom bela romano, ĉu ne, Oksana ? Eĉ en komerca aplikado.

Kristof' :

Laŭ mi, oni devus diferencigi du nivelojn en tiu ĉi debato : komercaj aplikoj de esperanto ekster la movado kaj en la movado.

Komercaj aplikoj de esperanto ekster la movado ŝajnas ĝoja utopio. La centra ideo de esperanto : enkonduki komunan lingvon en mondo disigita ne havus sukceson ekonomian.

La dua punkto : komercaj aplikoj en la movado estas pli grava afero, laŭ mi.

Kun certa cerbumado, oni povus reprezenti al si esperantismon kiel merkaton kie interŝanĝiĝas ideoj, varoj, kontraŭ mono. Ekzistas ekonomia cirkvito en la movado.

Sed, se oni volas, ke ĝi plivastiĝu, oni tamen devas kalkuli kun granda problemo ne facile solvebla : iu diris iam ke esperantistoj estas oriente kaj mono okcidente.

Sub formo de ŝerco, ĝi estas elprovita vero, kiu bone montras la realaĵon de la nuna esperantismo. Do tiuj, kiuj priskribus disvolviĝon de esperanto sen substreki tiun punkton, metus la debaton sur falsaj bazoj.

Tamen, mi konscias, ke esperanto kreskus, se la movadoj konvinkiĝus ke ili ĉiuj, en diversaj grupoj, povas alporti ion al la komunumo.

Rapide dirite, la movado devas transformiĝi de grupoj de konsumantoj al grupoj de produktantoj.

Jean-Claude :

Komercaj, vivtenigaj aplikoj certe estas potencaj instigoj, lingve la plej efikaj kaj la plej kontentigaj por parolanto, ĉar ili donas la plej oftajn okazojn praktiki la lingvon.

Sed necesas ankaŭ, ke ĉiu povu ĝin apliki en sia vivo, profesia aŭ ne. Tion montris al mi propran sperton kaj freŝdatan konversacion kun amiko tre favora al Esp-o. Li jam ĝin lernis, rekomencis post kelkjara forlaso kaj denove forlasis, ĉar li ne vidas aplikeblon en siaj nunaj agadoj.

Eble do utilis diskonigo de la multaj asoci- kaj revu- listoj, kiel ili aperas en la jarlibro de UEA. Sed ne en libro. Sur faldfolioj : ili estus pli facile sendeblaj.

J.G.

La leĝo de komerco estas konkurenco. La plej konkur- emaj entreprenoj pludaŭras nur eliminante la rivalojn. Dum la lasta jarcento Anglio trudis sian lingvon per la po- tenco de la komerca ŝiparo kaj de la kolonia imperio.

Post la dua Mondmilito Usono fariĝis la unua industria komerca kaj financa potenco en la mondo kaj la uson- angla la lingvo de la komerco, sed nun la situacio iom ŝanĝ- iĝas. Aliaj landoj eniras la komercan merkaton : Japanio, Sud-Koreio, kaj baldaŭ Ĉinio. Kiam oni legas la tradukojn de uzmanieroj pri produktoj aŭ materialo el Orienta Azio, estas ofte ridindaj ĵargonajtoj. Sendube, esperanto facil- igus la aferon, sed unue, ĉu la komercistoj akceptos forigi la antaŭjuĝojn pri Esperanto kaj due, ĉu la "idealistaj" esperantistoj povos akcepti la komercan ĝangalon?

Ĵanseb :

KIOM DA MILIONOJ DA DOLAROJ ?

Kompreneble, estus bona afero por ni, ke Esperanto profitu de la fortoj de la komerca sistemo : per sufiĉe granda investo, la aferoj povas **funkcii mem**.

Ekzemple, neesperantistaj profesiuloj presigus esp-ajn librojn kaj vendus ilin, kaj niaj samideanoj bezonus nenion fari, krom verki ilin kaj esti sufiĉe multnombraj kaj riĉaj por aĉeti ilin.

Bonvolemo estas ja bona afero, sed kiel indikas ĝia nomo, ĝi funkcias nur tiam, kiam oni bonvolas. Kompreneble, mi ne subtaksas bonvolemon, kiu enhavas entuzi- asmon kaj fidon je la celo.

Sed mi firme opinias, ke montarojn supreniras fido, sed nur dank'al profito oni ne refalas.

Do ni devas havi monon kaj por tio vendi produktojn aŭ servojn, kiuj utilas al la aliaj aŭ al ni mem.

Imagu la sumon, kiun meza E-isto devas elspezi ĉiujare, nur por esperanto. Konfesinde, iuj povas, dank'al ĝi, ŝpari



monon, ekzemple uzante la pasportan servon. Sed la aliaj? Ili elspezas almenaŭ 500 FF (80 us-dolarojn) nur por abonoj kaj kotizoj.

Tiukoste ĉiu hobiano povas aboni sufiĉe dikan kaj en- havoplenan revuon, kun reklamo, informoj, ktp.

Imagu, ke tio ekzistus en Esperantio? (ne temas pri "Laŭte!", kompreneble, kiu estas nia "Katenita Anaso").

- Mi eliras el la trajno, - ni imagu -, kiel ĉiutage, mi eniras en gazetbudon, aĉetas revuon pri Esperanto kaj le- gas la ĉi-monatan novaĵojn. Inter la paĝoj estas reklamo pri esperanta ferio-vilaĝo. En ĝi estas aktivecoj, trov- eblas servoj, oni prizorgas la infanojn... ktp. Mi decidas

enskribiĝi. Mi sendas ĉekon... Utopio?

Kion alian ni povas vendi? Tradukojn? Certe ne literaturajn, sed por teknikaj dokumentoj, kiel uzklarigiloj, ekzemple.

Imagu, ke iu malgranda firmao deziras vendi aparaton en Eŭropo. Ĝi devas traduki la klarigilojn en plurajn lingvojn. La rezulto, kiel oni povas ofte konstati, ne ĉiam estas klara.

Esperanto povas alporti pli da bonkvalito : la antaŭa esperanta traduko ebligas plian kontrolon de la klareco de la originalo. Traduko el Esperanto en iun ajn lingvon estas senproblema, kion pruvis la sistemo D.L.T.

- Vojaĝoj? Oni povas imagi interlandajn, mikajn renkontojn : autobusa vojaĝo, kun spertaj kaj komencantaj esperantistoj, kiuj vojaĝas en fremda lando, kie atendas ilin grupoj da samideanoj, kiuj vizitigas siajn urbojn. La formulo povas esti sufiĉe alloga.

- Pri gazeta agentejo, la formulo restas trovenda.

Kiujn informojn nia reto povas alporti, kiujn ne povas alporti la nunaj agentejoj kun siaj imponaj rimedoj?

Eble baldaŭ oni ne plu demandos al ni "Kiom vi estas?" sed "Kiom da milionoj da dolaroj oni elspezas ĉiujare en Esperantio?"

Nicole D. :

Legante la tekstojn de Patriko kaj Ĵanseb, ŝajnas al mi ke ili miskomprenis aŭ memvole ignoris la klopodojn, la agadojn pasintajn kaj nuntempajn de multaj esperantistoj, por ke Esperanto utilu ne nur ideologie sed praktike... Ĉar, ĉu la plej grava celo de la internacia lingvo ne estas ebligi senperan komunikadon inter nesamlingvanoj? Kaj, ĉu tio ne estas la plej praktika, la plej valora (eĉ se ne mondana) apliko de Esperanto?

Ke ĝis nun la Esperantistoj ne sukcesis disvastigi grand-skale Esperanton, ke ili estas minoritato, estas fakto, kies kialoj estas ne tiel facile troveblaj kaj analizeblaj.

Kial ĝis nun Esperanto ne estas agnoskita kiel mondana produkto? Estas blokadoj je multaj niveloj : psikologiaj, mensaj (eble la plej firmaj), sed ankaŭ politikaj kaj ekonomiaj.

Esperanto en si mem ne estas neŭtrala, pro tio la klopodoj por praktikaj aplikoj komercaj ne estas tiel facile realigeblaj kaj sukcesdonaj.

Ankaŭ pro tio estas nepre necese, ke en Esperantio estu diverse kompetentaj homoj, por disvastigi Esperanton pere de la plej diversaj servoj.

Jam Ĵanseb kaj Patriko prezentis plurajn komercajn aplikojn de Esperanto, en kiu la internacia lingvo rolas kiel pontlingvo.

Eble ĝuste tiu kapableco, tiu kvalito donas nuntempe pli da ŝancoj por ke Esperanto iĝu komerce ekspluatebla.

Sur papero estas facile fari proponojn, sed konkrete agi estas alia afero!

Mi scias, ke mi havas nek kompetenton, nek emon por komerco, eĉ pere de Esperanto.

*Por konkludi mi diras nur : Ĉiu afero en sia tempo,
al ĉiu laŭ ties kompetenteco...*

Suzanne :

Nun la homoj vivas en socio, kies nura motivo estas la materia flanko, la profito. Mi bone komprenas, ke la plejmulto de niaj samtempuloj estas logataj per tia motivo. Ĉar tiu cirkonstancaro neniigas la spiriton, la humanismo estas tute ne laŭmoda, tamen ĝi ĉiam estas, estos konsiderenda.

Do, pro la ĉi-supraj argumentoj la esperantistaro konsideru la materian, teknikan flankon. Ekzemple : la tradukprojekto per la maŝino D.L.T.. Certe per tiaj argumentoj verŝajne iuj samtempuloj interesigis pri la ebla facileco. En tiu teknika kampo Esperanto fariĝas kvazaŭ ilo. Bone... Sed ĉu profitdona afero instigis la kreinton de Esp-o? Ĉu li starigus profitdona asocion? Tute certe ne! La ĉefaj fontoj de lia inspiro estas Frateco, Justeco, Libereco, Amikeco. Laŭ mi, la esperantanoj (esperantanoj), kiuj aspiras al profita agado, devojiĝas de la Zamenhofa celo. Verŝajne ili rebatus : "En nia epoko monon oni havu." Fakte, ĝi estas necesa por ion ajn fari ; ekzemple, pri la E-kotizoj kaj similaj ; sed ne por havigi al si kapitalon! Ja ili pensas "Tio estas opinio de utopiulo". Tute ne!

Ja fido ebligas klopodegojn, sindonemon, konstantan

fidelecon, aktivecon; sed pri ĝia falo ne kulpas la profitmanko en Esperantujo. Tiom longe estos kerno de sindonemaj homoj, kiuj zorgos pri la daŭrigado, la progresado de la asocio, falo ne okazos. Inter la gekamaradoj, kiuj diversmaniere sin dediĉas al la movado, iuj regule plenumas siajn taskojn. Ja, kiel en ĉiu ajn organizo, eĉ en la homa socio, tiaj homoj estas malmultaj. Jen la plimulto el la civitanoj preferas sekvi aktivantojn ol mem aktivi. Ĉiel, koncerne la esperantistaron, tiuj, kiuj agadas en la movado, vartas ĝin kiel familian aferon; ili havas la konvenan fervoron, kiu igas ĝin vivanta organizo, vekante la intereson de la anaro.

Ĉu la eventualaj aĉetontoj de la dika, enhavoplena revuo ktp... estus tiel fervoraj, fidelaj al tia eldonaĵo? Ĉu regule ili aĉetus ĝin? Finfine, povus esti, ke ili aĉetus ĝin nur de tempo al tempo, laŭ la teknikaj temoj, pri kiuj ili interesiĝas. Ĉiukaze, tiaj legontoj tute ne interesiĝus pri la E-movado, ĝia progresado. Ĉu tiel agu la disĉiploj de Zamenhof? Ĉu ne estus fuŝado de grandanima celo?

Ĉu tia enhavo estus plejparte altvalora, inda je tia abonprezo? Ĉu ĝian reklamaron ne trafos sorto simila al tiu, kiun spertas la reklamoj, kiuj plenŝtopas ĉiujn leterkestojn? Plejofte ili ne estas legitaj, eĉ ne rigarditaj. Koncerne la turistojn: la plejmulto kontentiĝas per la agenteja programo; la klarigoj en ilia nacia lingvo sufiĉas al ili. Nur la "intelligentaj" turistoj interesiĝos pri Esp-o, ĉar ili serĉas rilatojn kun la landanoj.

Ĉu la vojaĝagentejoj ne jam proponas al sia klientaro allogajn proponojn?

Mi opinias, ke vole-nevole la potenculoj, la ŝtatestroj, pro la forto de la cirkonstancaro, uzos esp-on; sed ili ne volas ĝin ĝeneraligi. Tial nur en fakultatoj, mezlernejoj, eblos ĝin lerni. Kial ne starigi por esp-o saman projekton kiel por la angla lingvo? Tio estas, lerni ĝin ekde la elementa lernejo. Ho, ni bone komprenas: la laboristoj, la regatoj ne rilatu kun alilandanoj, ĉar tiam la cerboŝtopado estus malfacila kaj same malfacile estus trovi heredan malamikon.

Korespondado ofte naskas grandan amikecon, kiu foje vastiĝas al la familianoj. Mi tion spertas. Antaŭ 27 jaroj mi ekkorespondis kun germano, nun 94-jara. Spite malsanon,

(fin) malsupre de la sekvanta paĝo)



Pasis preskaŭ 10 jaroj...

En printempo 1979, okaze de la SAT-Amikara kongreso en Avinjono, mi tie renkontis k-don Jullien, Aiksanon. Ni kune promenis ĉe la bordo de Rodano, sidis sur kaja parapeto apud tiu ponto de Sta Benezet, famigita en tuta Francio per franclingva popolkanto:

*Sur le pont
d'Avignon...*

Ni interparolis alterne en la provenca dialekto kaj en la lingvo internacia: la nostalgia idiomato de la prapatroj kaj la esperdona tutmonda interkomprenilo; la kutima lingvo de miaj arlezaj geavoj, kiun mi aŭdis ankaŭ en mia 20-a jaro sur la stratoj kaj placoj de Aikso-la-Provenca, kaj tiu esperanto, kiu estis dum 60 jaroj la komuna lingvo inter mia patro kaj mi.

Kun Jullien mi interŝanĝis spertojn pri niaj respektivaj projektoj. Dum mi komencis esperantigi la "Poemon de Rodano", li entreprenis, 120 jarojn post ĝia apero, tradu-

funebro, li regule skribas, verŝajne ĝis sia malapero. Mi ĵus ricevis leteron, en kiu li skribis: "Vivu la franca kaj germana amikeco!"

Pardonu al mi tiun detalon, sed ĝi montras la ĉefan celon de Esp-o. Zamenhof tion deziris.

Mi forgesis substreki, ke kelkfoje ne eblas al izolita esperantisto, eĉ se agema, helpi en la movado.

kon de "Mirèio", la mondfama majstroverko de la 29-jara Mistral. Ho ve! Jullien ne vivis sufiĉe longe por finplenumi la komencitan taskon. El tiu monumento de la tutmonda literaturo, jam tradukita en multaj naciaj lingvoj, restas en esperanto nur parta skizo : la tri unuaj el la 12 kantoj, tradukitaj de Champion kaj Noël en la komenco de la nuna jarcento, kaj la nefinita manuskripto de Jullien - se ĝi estas konservita.

Mi vokas al junaj provenĉaj gesamideanoj, kiuj ankoraŭ scias la lingvon de Mistral ; por ili, aŭ unu el ili, estus bele repreni la falintan torĉon, kaj finfini la esperantigon de "Mirèio". Mi ne vivos ĝis tiam, sed ne grave : la estonto estas via!

Fugit irreparabile tempus*

En afabla letero bonintenca samideano esprimis al mi la bondeziron, ke mi vivu cent jarojn. Dio min gardu de tia plago, se Li ekzistas, kaj degnas aŭskulti mian preĝon. Ĉar, krom la honorinda escepto de tiu 118-jara japano, kiu estas ankoraŭ sana kaj vigla, ĉiuj centjaraj homoj, kies fotojn mi vidis, estas terure kadukaj kaj kriplaj. Nu, miaj nunaj kriplaĵoj tre sufiĉas al mi, dankon, mi ne sopiras al pliaj.

Oni diras : Ĉiu aĝo kunhavas siajn plezurojn. En mia aĝo mi vidas nur unu, cetere altvaloran : nome la ĉirkaŭeston de genepaj aŭ genepidaj kapetoj. Krom tio la "plezuroj" de la maljuneco ne estas tiuj, pli ŝatindaj, de la antaŭaj aĝoj. Ho Doktoro Faŭsto, kiel mi komprenas vin! Se iu aminda diablo proponus al mi rejunigon, certemi ne kuraĝus rifuzi, kaj mi ne dirus : Retroen, Satano! Bedaŭrinde mi konas nek dion nek diablon nek maŝinon por traplorigi la tempon. Mi konsentas kun Ejnŝtejn, ke la tempo estas nur la kvara dimensio, sed ĝi estas, ho ve! fuŝe privilegiita dimensio, kiun ni povas trairi nur laŭ unu direkto, kaj je nevariigebla rapido. Ni estas malliberuloj, sklavoj de la tempo. Ĝi fuĝas preter ni, kaj ni ne povas haltigi, akceli nek malakceli ĝin, ĝi estas de ni nekaptebla.

Fuĝas la tempo - aŭ pli ĝuste kiel skribis Ronsard :

Foriras temp', foriras, mia Dam'...

Ve! ne la temp', sed ni mem iras for

(traduko de Waringhien, "La Renesanca Periodo")

* Neripareble fuĝas la tempo -(Vergilio, Georgikoj III,284)

Foto el Japanio

Japana amiko sendis al mi foton, kiu montras lin, en nov-jara bankedo, apud ĉarma geĝso. Ĝi revigis min. En Francio bedaŭrinde ne estas geĝsoj. Nur publikulinoj, iafoje belaj, dezirindaj, spertaj pri amoro, sed plejofte senkulturaj, senspritaj, kiam ne tute stultaj ; en mia aĝo, kompreneble, ili ne logas min, kvankam ilia konversacio povas esti interesa el sociologia, etnologia vidpunkto.

Eble en la greka antikveco la hetajtoj estis iel similaj al geĝsoj. Nuntempe, ĉu tiuj ĉi estas nur japana specialaĝo, aŭ ĉu similaj ekzistas en aliaj landoj? Kredeble en neniun okcidentan, kaj per tio ni povas mezuri la diferencon inter nia krudeco kaj la rafinita kulturo de la Ekstrem-Orientanoj.

En tiu moro ja kuŝas ia "masklismo", ĉar la rolo de la geĝso konsistas el distrado de viroj, do al ia servado : geĝso estas almenaŭ tiom kulturita, kiom la virsinjoro, kun kiu ŝi rilatas, sed tio ne signifas veran egalecon inter la seksoj.

Iam Lanti, vivante kelkan tempon en Japanio, skribis pri geĝsoj, sed mi suspektas, ke li ricevis pri tiu afero nur supraĵan konon. Estus interese aŭdi aŭ legi seriozan prelegon de japana klerulo pri tiu temo kun socia signifo. Al vi, japanaj samideanoj, jen estas bona temo por artikolo en **Laŭte!**

Ho Dio ! kiom da krimoj estas farataj
en Cia nomo !

Decembro 1988. Terurega tertremo detruis tutajn urbojn en Armenio, farante en tiu malfeliĉa popolo dekmilojn da viktimoj kaj centmilojn da senhejmigitoj dum tiu ĉi frosta sezono.

En tuta Sovetio kaj en tuta mondo tuj impetis grandega solidarmovo. Inter la propramovaj savemuloj kelkaj pereis en aervetura akcidento. Meze de tiu koncerto de homa sento tamen sonis unu misa noto. Oni rakontas, ke en najbara lando fanatika amso da islamanoj disfluis sur la stratoj, ĝoje kantante, ke tiu natura kataklismo estas

justa puno de Alaho al la miskredanta (kristana) armena popolo. Ja tiuj frenezuloj aŭdacis alvoki la nomon de sia Dio, kiun la Nobla Korano nomas "pardonema kaj bonkora".

Ĉu ni diru, male, ke tiu amasmortiga tertremo estas nova ekzemplo de tio, kion Sébastien Faure nomis "la krimoj de Dio" ? Aŭ ĉu ni ankoraŭfoje konstata, ke la krima stultego de piaj kredantoj ekzistas kaj furiozas en ĉiuj landoj kaj en ĉiuj religioj ?

Laŭ la Sankta Biblio, fonto kaj fundamento de la tri monoteistaj religioj (juda, kristana kaj islama), Dio kreis la homon laŭ sia bildo kaj similo. Nu, ĉiutage ni vidas homojn rekrei sian Dion laŭ sia propra bildo kaj similo, t.e. stulta kaj kruelega.

Kontribuo de nova L!-kunlaboranto :

Dimitri

FIELLITIGĀĈO...

- "do, laŭ niaj lastaj informoj, ŝajnas al ni, ke eble, la ministro pri la justico intencus obeigi per nura fingro-svingo, samtempe la gardistojn kaj la malliberulojn".

Huj! Aj! Kio ? Kial ? Kiu parolas ?

Ho ve, kial tiu radio-vekhoro ekparolas tiel frue?

- "via plej amata animanto parolas, ne reendormiĝu, jam estas la sepa precize".

Estu damnita tiu, kiu inventis samtempe vekhorloĝon, laboron kaj lundon !

Rapide kaj senbrue salti el la lito (fakte preskaŭ fali). Vigle kaj efike sin vesti (kie do estas miaj vestoj ?) Ekgluti panon kaj brosi la dentojn.

Malfermi la pordon, reŝlosi ĝin, malsupreniri la knarantan ŝtuparon kaj subite ekesti ekstere en malvarma lumo de malvarmega mateno en finiĝanta novembro.

Urgu Dimitri, la laboro ne atendas, ĉar la estro ĉiam senpacienca ; feliĉe la motorbiciklo ne rifuzas ekfunkcii. Sur ĝia dorso (selo) mi antaŭiras al la torturo, turmento, pardonu min, fakte mi celas atingi mian laborlokon.

Eble vi jam scias, ke mi estas mesaĝisto ; sur fiera batalĉevalo ? Ne, sur pafkrakadanta durada veturilo. Dum la tuta taga longo mi iras tien, revenas ĉi tien, enŝoviĝas inter la malamikajn aŭtomobilojn, ricevas per radioaparato kontraŭdirajn ordonojn : - "rapide iru ĉe Tian (norde), sed urĝe pasu ĉe Tiun (sude), sen forgesi iri ĉe Tion (aliloke)".

Vere tiu estro estas freneza, nelogika, vera sklavecpartiano. Ĉu li kredas, ke mi estas maŝino, ke mi farigigas roboto, ke mi havas nek animon, nek sensivecon, ke mi estas rezista kiel fero, fleksebla kiel ŝtalo, necedema kiel mi ne scias kion. Kaj tiu fiveteraĉo, la pluvo, la vento, la malvarmo, la neĝo, la glacipluvo ; kaj tiuj ĉiuj aŭtistaĉoj, kiuj senĉese, tuttage, celas min, preskaŭ tuŝetas min, malamas min, surdigas min... Vere mi estas kiel viktimo, ostaĝo en tiu kruela trafiko !

Finite, estas finite !

Mi tuj malŝarĝos mian koron, mi ellasos mian koleron, mi forregalos tiun malbonegan laboraĉon, tiun senkoran estron, li ne plu povos mistrakti min kiel buĉbeston...

Uj, mi preskaŭ preterpasis la oficejon.

Uf, feliĉe mi ne malfruas.

- "Bonan tagon, estra moŝto, kiel vi fartas ? Ĉu vi bone tranoktis, kaj la bebo, kiel li statas, ha jes, feliĉe, ĉu ankaŭ la edzino, bone, tre bone,..., iri tien tuj ? kompreneble, senprobleme, mi tuj iros, kiel eble plej rapide..."

mesaĝiste kaj Dimitrie via...

Listo de SAT-Broŝurservo

Elĉerpigis : **Kio estas SAT ?** (mendi rekte al la SAT-sidejo)

Momente elĉerpita, reeldonota : **Lingvaj anguloj** (Baronnet)

Aldonu : **Esperanto de base** (EB) prezo : 0,50 FF

La antaŭvenantoj de anarkiismo (E.Armand), kodo Aa, 4 FF

Restas nur malmultaj el : AO, AR, KF, VI, VL1. Mendu antaŭ ol estos tro malfrue...

ALÁTIR

(resume kaj cite)

Kie staris iam fungoj ĉirkaŭ l' Roko Alatir, nun staras urbo. Supozeble pro l'fungoj oni naskis abunde. Infanojn oni baptis dekoje. Kaj veturis nur laŭ la ĉefstrato, por ne trafi infanojn.

Sed militiris la turka reĝo. Kaj, kiel fiŝoj en rivero - formigris la fraŭloj. Skandalo : ĉe l'pastro restas fraŭlino, ĉe R.R. - ok, ĉe l'juĝisto - Glafira.

Matur-sekala. Pianludas. Sed sentas, ke ŝi velkos, velkos. La tutan tagon kukolas sopiro. Sed nokte ŝi varme vivas, atendante leteron el tranoktejo aliflanke de l'strato - sed vane : la sola letero reklamas pri pudro. Kolere ŝi mortsvingas la gekanariojn.

Ivan Makariĉ (la juĝisto) telegrafistinigas ŝin por kapti edzon. Post du senefikaj jaroj li fermas sin en la kabineto kaj inventas : baki panon ne per gisto, sed - per kolomb-fekoj. Provu liaj malliberuloj... Jen ĉie tra la domo banbuloj.

Li vokas Potifornan, bazarulinon, kiu post tri semajnoj sukcesas ĉiujn forvendi - kaj rekompence petas Ivan Makariĉon helpi la filon Koĉjo trovi oficon... sed, ho ve, la knabo verkas! Telegrafisto li estu.

Blanka Milka naskis kvar katidojn. Pro tio la mamoj de nekisita Glafira petegas karesojn... Sed jen : tiu Koĉjo. Ŝi rapidas al li en kaleŝo, timigante la surstratajn kokinojn. Long-kola, kvazaŭ ĵus eloviĝinta... Ne, ne li. La patrino de Koĉjo regalas Glafiran per kafo - aĉetita antaŭ kvin jaroj en Voroneĵ. Blanka urso sur la skatolo - simila al Milka - larmigas Glafiran. Sed Koĉjo alportas sian kajeron "Verkoj de Konstantin Editkin, nome Mi" - kaj ridetigas.

Koĉjo komencas lerni de Glafira. Ŝi ĵus konstatis, ke ek-kreskas barbo - kaj fortondas la orajn harojn. Koĉjo deklamas la parkeritan dum ŝi sidas nur bustvestita. Laŭpete li tenas la spegulon - treme.

Li tamen sukcesas l'ekzamenon kaj telegrafistiĝas.

Ivan Pavliĉ, nobelo, kun vizaĝo kvazaŭ iu regalís per teo kun kvin sukerpecoj, ĉion ekscias la unua. Do oni volonte gastigas lin - precipe la pastro, iam verkinta pri "La vivo kaj nutrado de diabloj". Li malkaŝas, ke la nova poŝtestro estos princo... eksedzo. Baldaŭ scias ĉiuj. Neniu dormas. Morgaŭ estas longa vico ĉe l'poŝtejo. Rigardu : kia mentono

... mankas!

Kaj li iras tra l'bazaro kiel ĉiuj.

Jam degelas - sen geedziĝoj. Krespoj l'antaŭfastan tagon.

Ĉu princoj manĝas kun butero? Ne, nepre kaviaro, laŭdire. L'edzino de Ivan Makariĉ gastigas. Glafira igas Koĉjon formanĝi ĉiujn krespojn fuŝitajn. Ĉiuj venas por danci : pastridino Barbara, l'ok filinoj de R.R.... La princo, dancante, tretas la robon de unu el ili. Ivan Makariĉ ek-rakontas, kiel baki panon malmultekoste. "Sed ĉu gravas inventi kiam mankas komuna lingvo?", la princo diras. Ĉiuj gapas. Barbara ĉetable ĉirkaŭbrakas Glafiran, miele parolas... Sed malvestante sin Glafira trovas truon en la punta robo. Ŝi ne povas dormi. Tra lorneto ŝi vidas en la tranoktejo - je la tria matene - la princon skribi (ĉu leteron al ŝi? - ne, li sendas monon al l'eksedzino).

Hejme Koĉjo devas manĝi eĉ pli da krespoj - de la patrino. Morgaŭ li sentas sin mortanta pro la ventro. Li vokigas Glafiran... sed ne mortas - la pastro kuracas lin per brando.

Post absolvoj la pastro mem bezonas brandon - kaprokapulo lin vizitas kaj mordas lin hund-dentoj de Barbara.

Pasko. Koĉjo staras apud Glafira en la preĝejo, relumigas sian kandelon per la ŝia. Sed kiam li demandas pri geedziĝo, ŝi evitas lian rigardon.

La princo promesis anonci sian sekreton je Pasko. Sed ĉiuj trinkas likvorojn, li ne trovas taŭgan okazon. Li veturas al la pastro, sed porko blekas kontraŭ la ĉevalo... Hunde Barbara petolas ĉe liaj piedoj en la krepusko... li forkuras.

Sed la postan feston li invitas al la poŝtejo - ĉiuj kun filinoj venas. "Gesinjoroj! Laŭ l'evangelio ekzistas nek grekoj nek judoj nek... Nur - unu grego. Sed ni... En grego - ĉu oni diverse blekas? Sed ni - tiu tiel, tiu tiel, ĉiu alie. Do militoj kaj tiaj aĉaĵoj, sed se grege... Per unu granda lingvo Esperanto la tuta mondo - komenciĝus bela vivo kaj universala amo... Ĝis la lasta mondfino..." Multaj subskribas - plejmulte knabinoj, sed ankaŭ la pastro, Ivan Pavliĉ, R.R.... Nur triopo volonte lernas dum la varma somero : Koĉjo, Glafira kaj Barbara. Sed la patroj eltenas pro l'filinoj... "Leono esta forta. La denta esta. acra", la princo diktas, forŝtelante la finaĵojn. "Esta - 's' fine. Acra - 's' fine, Ivan Pavliĉ flustras al Ivan Makariĉ.

Unu sabaton venas iu por montri "nebulajn bildojn" (anstataŭ leciono). Koĉjo ne sukcesas sidi kun Glafira.

Belulino rendevuas kun markizo sur l'ekrano. Koĉjo ekstaras por averti pri danĝero. "Kompreneble - li ja estas poeto", Glafira diras poste al Ivan Pavliĉ, starante kun la princo.

Ivan Pavliĉ ŝovas tri liniojn en gazeton: "Pri la poemoj de juna verkisto Editkin, ilin ni opinias aparteni al elstara literaturo." Do Koĉjo devas efektive verki. Li relegas "Dogman Teologion" - libron ŝatatan, ĉar ĉio estas nekomprenbla, nobla - kaj ekverkas pri nova kredo. Li legas antaŭ ĉiuj. Komence "l'interna ina dogmo de dieco". Sed je l'dua ĉapitro, pri la oka universala eklezio, ĉiesa religi-geedza vivo, oni jam ridas...

Severa vintro. Oni pardonpetas pro malsano, kaj restas nur du kursanoj: Glafira kaj Barbara, ansere siblantaj unu al la alia. Post leciono la princo ve-spiras; sed tamen ni estas unu tagon pli proksimaj al la hela Pasko kiam ĉiuj samlingve ĉirkaŭbrakos unu la alian... Li kolektas paperpecojn lasitajn surplanke: "Princino Katarina" "Kanjo, stultulino" **"Mi amas tin, amas, amas..."** en fuŝita man-skribo. Tra prujna fenestro el Glafira kreskas ŝi, kuniĝas kun la granda lingvo. Ĉiuj Esperanto-vortoj estas nun duoble dolĉaj: ĉar - ŝiaj vortoj. Ŝiaj bluaj, profundaj okuloj kaptas la tutan mondon, amas kiel la lingvo Esperanto...

"Ĉu nur la tutan mondon? La tutan universon. Sur Venuso iuj loĝantaj veneranoj nepre jam scipovas Esperanton".

Kaj li vagas plu en l'arĝentaj arbaroj.

Koĉjo sekvas lin.

Ivan Pavliĉ, ŝercemulo, informas Koĉjon pri rendevuo - de Glafira kaj la princo je la kvara posttagmeze ĉe la Roko. Sed neniu venas.

Kristnasko. Ivan Makariĉ inventas netrempeblan ŝtofon. Kvin minutojn iu tenos sitelon... sed la kvinan ĝi trempigas, la pastro ne plu povas elteni: li ekridas...

Kaj hejme li revidas la diablon. La policano arestas lin nudan ĉe la Roko, venigas lin al la juĝisto por pruvi, kiu li estas. La vespermanĝo estas preta - Barbara serĉas lin. Sed l'edzino de l'juĝisto demandas ŝin pri notoj al la princo (kvankam tiu ĉi sekretis, rakontis nur al Ivan Pavliĉ), pri anoncita rendevuo...

Sed la princo ne iris. Li bedaŭris rompi iluzion. Epifanion - plua noto. "Mi vin, damniton, tutan horon atendis - ĉu frosto, laŭ vi, dolĉas? Kaj vi nomiĝas - princo! Nu, se vi ne venos tien morgaŭ, mi, je Dio, foriros - ne plu skribos.

Volonte mi forkraĉus vin, eĉ se vi estus fiprinco." Ne en la granda universala lingvo, sed en la kruda, tera. Skribas ne ŝi, ŝi - mortis. Nu, eble mi iros, ne gravas.

La naŭan matene, sur glitejo. La suno trompe, glacie brulas. Sur neĝo - odore - apenaŭa materuĝo. Hundbudo en angulo. En kaloŝoj apud ĝi - ŝi. Nigrabukla, hundokula. "Barbara... forkuri" sed li ne povas.

En la preĝejo la pastro konsekras l'akvon. Ivan Pavliĉ flustras al Koĉjo pri la rendevuo. Li kuregas - glutas la aeron kvazaŭ fiŝo. Sed jen - ne morto, sed vivo: jen - Barbara. "Pardonu, adorata" - li forkuras al Glafira.

Ŝi fortondas la mentonharojn - ili kreskas plu, fiuloj. Koĉjo preĝkunigas la manojn, larmoj glitas inter lentugoj. "Sur la glitejo - Barbara kaj la princo..." beste, fermokule, surgenue.

Frakasiĝas la spegulo.

"Sur la glitejo? For de l'vojo! Ne baru!" - Glafira tien ekkuras.

Kvazaŭ dum fulmo survojan folion, grizan haron sur tempio... Koĉjo vidas ĉion.

La patrino revenas gaje de l'bazaro. "Ĉu vi aŭdis?"

"Ili gratis unu la alian pro la princo - senhonte! Banjo, hundinaĉo, sangigis la juĝist-filino. Jen la princo de ĉi mondo, la diablo!"

Koĉjo luminiĝas: la princo de ĉi mondo - jen. Kaj tiu lingvo... ĉiujn fuŝis, ĉiujn kaptis - la princo de l'mondo.

Matene Koĉjo iras frue al la poŝtejo, skribas al la princo. La princo venas - malgaje - kaj skribas al l'eksedzino. Koĉjo svingas liniilon. Sed ne batas - kompatante lin, sin, Glafiran, ĉiujn... "Ni pereis!"

En karceri li eĉ rifuzas donacojn.

(1914)

La Broŝurservo ĵus eldonis:

"ESPERANTO DE BASE"

Temas pri simpla folio en A4-formato, kiu enhavas unuflanke resumon de la gramatika parto iam entenata de "Espéranto de poche", aliflanke bazan vortaron E-francan, sume ĉ. 500 radikojn aŭ gramatikajn nociojn.

Ĝi taŭgas ĉefe por doni al franclingvanoj ĝeneralan ideon pri E-gramatiko kaj vortaro. Prezo: ĉiu folio, 0,50 FF, plus afranko. Mendkodo: EB.

Meva Maron :

TRANS MALPERMESITAN ZONON

Mi atendis ĝis la tago de l'mortintoj por respondi pri post-morta vivo al Laŭte 78. Kaj samtempe pri Transilvanio, ĉar ni aŭdas multon lastatempe de l'hungara flanko. Mi komprenas la hungaran, do aŭskultas la hungaran flankon pli atente; sed mi sentas devon peni ankaŭ nekonatan lingvon, la rumanan, aŭskulti. Mi trovis unu voĉon kiu tra mallertaj traduk-oj parolas al ni, la voĉon de Helena, ni diru (Ileana Mălăncioiu : ĉu /iljana malanĉoju/?) kaj mi penis pri ŝian voĉon jene.

Se poemojn vi ne ŝatas, prefere transsaltu l'unuan; la ceteraj pli timigas, sed pli simple. Aliflanke, se malplaĉas piednotoj, transsaltu la sekvontajn frazojn! Rolas en poemoj de Helena iu Herodiasa - kies filino petis de la patro, laŭ la biblio, la kapon de Johana la Baptisto sur telero. Laŭ juda tradicio, kiam Abrahamo pretis buĉoferi Isaakon al Dio, la filon lastmomente anstataŭis ŝafido, kiu poste simbolis Kriston - sed precipe al rumanoj havas gravan signifon; legu la poemon "Ŝafideto" en Tutmonda Sonoro, ĉar rumanoj opinias ĝin esenca fonto de iliaj sintenoj. Plue ŝafkranio - ĉu similas al serpenta kapo? Ktp. Nun respiru kaj eklegu la poemojn.

ŜAFIDVENENO

Laktflari. Alabastraj vejnoj,
marmora mamu, ŝtonmuzel'
el kiu trinkis jam serpentoj,
ŝafida kapo, diorel'.
Ponarde malfermitaj dentoj
de l'princo trinkas per ŝafid-
muzelo feĉon de l'veneno,
filakton ĝis makzelrigid'.

KAJ

TAMEN KIOM MI SOPIRAS

L'animo for de l'korpo soras,
lacerto sen la vostkiras'.
Mankanta membro min doloras:
por tia vund' nur penskurac'.
Mi volas, ke l'animo nestu
enmane, kovu kiel bird' -
sed timis ke nenio restas
de l'homo post la sensubir'.

MI KOMPRENAS

Vi estas sola, mi komprenas,
en griz', argilo, grundmalbril'.
Mi vidas, ke la buloj premas
kaj miras, ke ne mia argil'.
La vento lulas lignan krucon
kaj same skuus en trankvil'
pomflorojn. Griza tera krusto.
Vi estas sola en l'argil'.

EN LA CERBO

La cerbo monton kontrabandas,
ŝrumpintan, pretan por forir'.
"Nu, kio jugas?", li demandas.
Mi diras "Monto nur" sen mir'.
Dum ili elkapigis ŝtonon
post ŝtono : herbo, cervo for...
Kranion ili gapis, kronon
ovlikvan, fine de l'esplor'.

IE EN TRANSILVANIO

Mi vidis en Transilvanio
sanktulon kun surdorsa sak' :
la propra haŭto sub kranio
sternite pendas kiel jak'.
Sen ripdoloro li elportis
l'animon. Lumas ilumin'.
La solan korpon pretan morti
mi vidis en Transilvani'.

→

Sed sendube vi demandas pri la princo. Kiu princo? Aleksandro Lăpușneanu, kiu regis Moldavion ĝis 1568. Iam li malsanis. Grave. La nobeloj trovis testamenton ke li volas morti kiel monaĥo kaj la peton plej volonte plenumis. Sed la princo resaniĝis kaj, trovante sin monaĥo, kompreneble, malkontentis! La nobeloj siaflanke malkontentis ke li resaniĝis - do venenis lin...

NUR

Mi kuŝis en la haŭtĉemizo.
- "Sed dormi vi ne rajtas en...
Tuj! Brakojn supren!" Ne surprizo,
ke mi forskuis ĝin sen pen'.
Mi brodus ĝin se lumo restus,
mi serĉas sub la kapkusen'...
Sed nur reverse ja ĝi vestus
- kaj mankas nadlo kun faden'.

NE PLORU

Juglandoj verdas. La mortintoj :
neniu estas tute for.
Baril' alie ne putrintus
dum trans tombkrucon kreskas flor'...
Ŝafida kap'! Ho mia morto,
ne ploru! Baldaŭ en silent'
muzelo vin brustpalpos. Dormo
nur poste venos...

MAZDAĴETOJ

Kaj mi klopodegis

*Pli kaj pli ofte
mi enpensigas
pri trairita vojo,
kaj mi ne scias
ĉu mia vivo
al iu ajn donis ĝojon?*

Akuta koko

*La virkoko akra
estas ĉiam magra.*

Vira interesiĝo

*Mi ŝatas teni
enmane monon,
la telefonon,
dolĉan bombonon,
la monogramon,
sed mi plej ŝatas
la belan mamon.*

Ĉu vi konas ĝin?

*Kiam min deziro kaptas
- kun sopiro mi baraktas.*

Nia novelo :

Herbert W. Franke

La trovo

*Neniam manĝu nekonataĵon! Tio validas ne nur por
fremdspecaj fruktoj kaj naturproduktoj - tio eĉ pli validas
por kemiaj fabrikoj.*

*De tri semajnoj mi survojis. Kiel ĉiam mi iris sola.
La praarbaro estas mia amiko. Mi konas la marĉojn mal-
antaŭ Valladolid, la orkideaĵn arbarojn interne de Juka-
tano, kaj la kalkrifojn tie, kie surmape estas desegnita
la limo kontraŭ Honduraso.*

*Sed pumoj devis lasi sian vivon, kaj amaso da pli mal-
grandaj bestoj. La felojn mi enfosis. Sed mi mem iris plu
al la altebenaĵoj. Eble mi ree trafos je unu el la ruinlokoj.
Por antikva ornamaĵo la jankioj pagas egajn sumojn. Estas
vere, ion novan mi ne trovis - sed jam revoje mi ankoraŭ
serĉadis en la keloj de ruiniĝinta templokonstruaĵo, konata
de mi. Tie mi trafis sur la virojn.*

*Unu el ili sidis en remburita fotelo antaŭ aparataro,
kies funkcion mi ne sciis, la alia kuŝis longe etendiĝinte
apud la vando. Ambaŭ estis oldaj - ili havis blankajn har-
arojn kaj barbojn. Iliaj vestaĵoj memorigis pri trejnvestoj.
Ambaŭ estis mortaj - elsekiĝintaj, mumiiĝitaj.*

*Antaŭ la sidanto staris skatoleto kun sukerpecoj - al-
menaŭ opiniis mi ilin sukero. Mi prenis la skatoleton kaj
enpoŝigis ĝin. Longatempe mi serĉis pri ornamaĵo, sed ne
trovis iun. Mi trovis nur grandajn amasojn de plenskrib-
ita papero, dratoj, vitro, radoj, kaj similajn senvaloraĵojn.
Finfine mi kontentis pri kelkaj strangaj horloĝoj, kiujn mi
forprenis de la mortintoj. Elgrimpinte el la fenestro kaj
ripozante iom, mi gustumis pecon el la sukero. Nu jes, ĝi
tute alie gustis ol atendite, sed tre arome kaj agrable.
Tuj poste mi havis nekutimajn impresojn. La praarbara
murmuro ŝvelis al harmonio. La arboj fariĝis pli plastikaj,
la koloroj pli buntaj. Mi rimarkis aĵojn, kiujn mi neniam
atentis ĝis nun : la graciajn bestmovojn, la dancon de la*

folioj, la figurojn de spuroj ensable. Estis kvazaŭ oni malfermintus fenestron en mi. La marŝo tra la arbaro neniam antaŭe tiom multe ĝojigis min. Neniam mi venkis tiel facile malfacilaĵojn. Neniam mi tiel fortis kaj persistis, kaj eĉ pli en la unua vilaĝo, kiun mi atingis! Mi sentis min princo kaj kondukis laŭ tio. Kaj ĉiuj traktis min kvazaŭ ili sciis tion. Ĉiuj deziris regali min. La knabinoj fluge proksimiĝis al mi.

Ĝis poste la kverelo kun Cochito komenciĝis. Aĥ, faris egan ĝojon al mi montri miajn novajn fortojn! Mi batis al la ursoforta viro en la stomakon, ke li kolapsis teren. Poste mi lasis fali miajn krucitajn manojn de supre sur lian nukon kaj genue puŝis en la vizaĝon de la falinto. Kiam poste ĉiuj ĵetiĝis sur min, furioze kaj plene de malamo, jen tio ne terurigas, sed plezurigas min.

Mi kuris denove tra la praarbaro, celante la urbojn. Mi rimarkis bone, ke mia ŝanĝo devenis de la blankaj kubo, kiujn mi eĉ nun portis ĉe mi. Se ilia efiko malpliĝis, mi manĝis kelkajn el ili.

Alveninte Valladolidon, mi kuris al la plej proksima drinkejo. Knabino kun dek kruĉoj plenaj da Tequila sur la brakoj etpaŝe rapidis tra la ĉambro. Knabino fleksebla kiel serpento, bela kiel la diablo, kun blunigra hararo kaj brilaj okuloj. Mi paŝis al ŝi kaj tiris ŝin al mi. Mi estus batalinta kontraŭ ĉiuj gastoj samtempe - por ŝi. Sed lertaŭne ŝi liberiĝis de mi. Tondre ridis la viroj ĉe la tabloj.

"Razu vin, olduleto!" ŝi kriis kaj montris ĉe tio al obtuza spegulo en angulo. Sed tiu spegulo sufiĉis por montri al mi: Blankaj haroj blovis, griza barbo flirtis, olda ege sulkiginta vizaĝo retrorigardis al mi. Dum kvar semajnoj mi pliaĝiĝis je kvardek jaroj. Mi ŝanceliĝis al benko kaj sinkis malespere sur ĝin. Mi nun scias, ke oni senkoste ricevas nenion.

tradukita de **Hagen Hirte**
el la scienfikciaj rakontoj
"La verda kometo", Munkeno 1964.

GBEGLO Koffi :

MORTO

Laŭ PV, Morto estas perdo de vivo. Ĉu tiu fenomeno Morto estas timinda, ŝatinda de ĉiuj homoj, pli preferinda ol sia kontraŭo ? La respondo estus tutsimpla, MORTO estas multe pli timinda, malŝatinda ol preferinda por kelkaj homoj. Kial do multaj devas timi la Morton?

1 - Pro alkroĉiĝo al surteraĵoj
Iuj timas la Morton, ĉar ili ne deziras eliri el tiu ĉi vivo, kie ili ĝuas lukson. Multaj estas tiuj, kiuj sin alkroĉas al siaj amatoj : parencoj, geamikoj (edz(in)oj, ktp. Ili deziras ne forlasi ilin.

2 - Pro nescio pri postmorta vivo
Ĉu ekzistas vivo post la morto ? Ĉu mortinte, oni neniĝu ? Jen demandoj de multaj pri la vivo postmorta. Tial ili devas timi la Morton.

3 - Pro la interŝtupo inter la Morto kaj la Vivo
Ĉu tiu tempero estas doloriga ? Kial do la agonio de multaj mortantoj ?

Rimarkindas, ke ĝenerale la morto estas malŝatata. Tial multaj priploras la forpasintojn. Ne dubindas, ke la profetoj de la Biblio baziĝas sur tiu potenca timigeo de la morto por obeigi la homojn je siaj leĝoj.

Laŭ la Biblio, la vorto "Morti" aperis unuafoje en la mondo, kiam Dio devis paroli al la unuaj Homoj en Gen. 2:17 : "Sed de la arbo de la Sciado pri bono kaj malbono vi ne manĝu, ĉar en la tago, en kiu vi manĝos de ĝi vi mortos". Tiuokaze GRAVA DEMANDARO montriĝas : ĉu tiam, en la komenco de la mondo, kiam neniu jam mortis, la unuaj homoj povus kompreni kaj timi la morton kiel la postaj homoj, la hodiaŭaj ? Ĉu Mozeo, la verkinto de Genezo, ne transportis la timon de siaj adeptoj pri Morto en la komencon de mondo ?

Poste, en la Nova Testamento, estas skribite, ke "la salajro de pekado estas la Morto". Evidentiĝas, ke, pro la

timo de homoj pri la Morto, pekado estas iom limigita. Tamen la homoj devis kompreni, ke kaj pekuloj kaj nepekuloj mortu, kio montras, ke la Morto ne estas la salajro de pekado. Neniam mankas kialoj al la verkintoj kaj interpretantoj de la Biblio por refuti tiajn rezonojn. Tiam aperis du specoj de morto : la morto de la korpo kaj la morto de la animo. Iuj parolis pri la morto eterna kaj la morto neeterna. Kio pri tiuj mortoj laŭ la refutantoj ?

Spiritualistecaj Bibli-kredantoj klarigas, ke post la morto de la fizika korpo, la animo eliras kaj postvivas ; se tiu animo eliras el korpo de pekinto, ĝi devas remorti, neniĝi. Laŭ tiuj kredantoj la Biblio parolas pri tiu morto.

Aliaj kredantoj pensas, ke la morto estas ia dormo, dum kiu la mortintoj ne konscias pri io, ĉiuj atendas la revenon de Jesuo Kristo. Tiam Li devos relevi ĉiujn por la lasta juĝo. Tiuj, kiuj bonfaris, vivos eterne kaj la pekintoj daŭrigos sian dormon, ĝuante la eternan morton.

Nu, la morto, per kiu Dio atentigis la unuajn homojn en la Biblio, kaj la morto, salajro de pekado, ĉu temas pri la unua morto, ĉu la dua ? Ĉiuj scias, ke la unua morto estas la ordinara, tiun ĉiuj timas. Kia do povas esti la dua ? Kiu povas raporti pri tio ? Nur supozajo kaj imagajo.

Ĉiu kaj ĉio devas morti. Kiu aŭ kio mortis, tiu aŭ tio ne neniĝas. Laŭ universaj leĝoj, ĉio en la universo aliĝas, kaj la Morto estas unu el tiuj senĉesaj transformiĝoj. Kiu aŭ kio mortas, tiu aŭ tio malaperas tute aŭ parte, por generi alion.

BONVENON !

Bonvenon al la "**Kajeroj de la Sudo**", bulteno de Hispana Asocio de Laboristaj Esperantistoj (HALE), kies unua n-ro aperis en decembro '88 ! Tuj de la unuaj vortoj oni sentas la entuziasmigan efikon de humuro, kombinita kun simpatia modesteco, tamen ne senespera pri la estonteco.

La laborista E-movado jam de 50 jaroj estingiĝis en Hispanio. Fajrero ĵus aperis, kiu eble fariĝos arda suno...

Adreso de la sidejo : H.A.L.E., Str. Sol, 75,
E-41003 SEVILLA.

Aliĝo, kun la gazeto : SAT-anoj 300 pes. ; neSAT-anoj 600 pes.

1622 1673 M ★



M
O
L
I
È
R
O

44 • ESPERANTO
KONGRESO
DE SAT AMIKARO
25 27 MARTO 1989 PEZENAS

SAT-AMIKARO

laboristtendenca asocio por disvastigo de Esperanto en Franclingvio, organizas en urbo PEZENAS, departemento Hérault, Sudfrancio, sian jarkongreson.

Tiu 44a kongreso okazos en Liceo pri Metilernado la 25an, 26an kaj 27an de Marto 1989.

La 28an de Marto, tuttaga ekskurso ebligos al la kongresantoj viziti la ĉirkaŭaĵojn de la urbo de Molière.

Por pliaj informoj, sin turni al

* SAT-AMIKARO, 67 av. Gambetta, F 75020 PARIS

* CERCLE PISCENOIS ESPERANTO, Remo MAGNANI, Prezidanto, "Les Olivettes", CABRIALS, 34230 PAULHAN

NIA KRIMINALA FELIETONO

Christophe Albouy volis anstataŭigi 1 jaron da soldatservo per 2 jaroj da civila servo. Tion permesas franca leĝo. Sed Christophe sendis sian peton post la dato antaŭvidita de la leĝo. Tial la justico konsideras, ke tiu peto ne validas. Konsekvence, la armeo sendis al li kunvokon por la soldatservo. Christophe iris, sed ne povis porti pafilon. Tial oni akuzas lin pro oberifuzo. Li riskas 2 jarojn da mallibero.

Adreso : Christophe Albouy
Maison d'arrêt de Poitiers
209 faubourg du Pont Neuf
F 86036 POITIERS CEDEX

Antoine Gasnault, siaflanke, rifuzis la civilan servon. La 18an de februaro '87, li estis kondamnita al unu jaro da mallibero. Li fuĝis el la tribunalo. Sekve de la prezidenta afero, li estis amnestiita. Sed li ne subskribis la oficialan paperon pri tiu amnestio. La justico konsideras, ke pro tiu manko de subskribo la amnestio ne validas. La 18an de januaro 1989 estos nova proceso pri li. Li riskas du jarojn da mallibero.

Adreso : Antoine Gasnault
Maison d'arrêt d'Orléans
n°10509 cellule 132
14 bd. du Québec
F 45000 ORLEANS

ni reserĉas loĝejon !

Ni serĉas loĝejon kun malgranda kultivebla tereno en kamparo, eĉ montara, sed ne tro alta, en suda Francio (= sude de Luaro), kie ni povos loĝi dum la tuta jaro, ĉar la nunan loĝejon ni devos disponigi en ĉiu somero al feriantoj.

Lupago estu preferinde laŭeble modesta. Ni preferas ekologian ol modernan komfortecon, eĉ kun lignohejtleco, ĉar ni ŝatas vivi laŭeble aŭtarcie, nome minimume enspezante kaj elspezante monon.

Eventuale ni ŝatus aĉeti tian loĝejon kaj malgrandan terenon, se prezo estus minimuma (laŭ via sento) kaj akceptebla por ni, eĉ se loĝejo estus iom riparinda, tio ne ĝenus nin.

- Nu, se tie mankas esperantistoj aŭ E-kurso, ni estas pretaj fari ion tie por esperanto.

Ni atendas viajn ĉiaspecajn afablajn informojn!!!

antaŭdankon!

ana kaj Ijo, "esperanto", Le Bersac, 05700 SERRES

KORESPOND-DEZIROJ

Junaj nove bakitaj esperantistinoj deziras korespondadon !

* Jukiko Oikaŭa (OIKAWA Yukiko), 117 Iyashige, kumanosyo
Shikatsu-tcho, Aitchi-ken, 481 Japanio

Mi estas lernantino de supermezlernejo (= liceo en Francio, aŭ gimnazio en Germanio), kaj mi partoprenas al astronomio-klubo, Ruĝa-kruco kaj la pacdeziranta Aiĉi-guberniana teatrogrupo.

* Makiko MISIMA, 5-3 Funada kiho-tcho
Minamimuro-gun, Mie-ken, 519-57 JAPANIO
26-jara, mi amas desegni. Bv. skribi al mi!

Ĝus aperis ĉe SAT-Broŝurservo :

"Kie brulas, gentlemanoj?" (50 poemoj de Charles Bukowski)
esperantigitaj de Hagen Hirte. Prezo : 20 FF

Broŝurabonantoj, kontrolu sur la lasta paĝo de L! decembra pri la stato de via konto. Legantoj de L! same kontrolu, ĉu via abono ne estas finita. Por la reabonoj :


* al L! : 40 FF (por 1989), 80 FF (por 1989 kaj 1990)

* al la broŝurservo + Laŭte! : minimume 120 FF.

Dankon al ĉiuj, kies akurateco ege faciligas la laboron de la eldonanto!

Amika Esperanto- Rondo Aĝenia

(Cercle amical esp.
de l'Agenais)
franca, neprofitcela
asocio funkcia laŭ
la leĝo de 1901
(kiel kultura asocio)
proponas al la E-istaro



1) Jenajn nunajn servojn :

- * la dumonatan "Laŭte!"
(internacia, kultura kaj informa esprimilo en esp-o)
- * sian broŝurservon (eldonado de broŝuroj en la kadro de SAT-broŝurservo kaj ankaŭ por aliaj asocioj aŭ individuoj)
- * E-libroservon (kurslibroj kaj literaturaĵoj)
- * E-bibliotekon
- * E-renkontiĝejon "Moulin de Beauville", ĉefe por la praktikado de Ekologio kaj Esperanto en trankvila, kampara regiono de suda parto de Francio.

2) Kunlabori aŭ helpi por jenaj projektoj, ĉiam en asocia, iel kooperativa kadro :

- * Ekipado de la E-Renkontiĝejo/Restadejo (vd. ĉi-poste la priskribon de la loko)
- * Parolajn kaj perkorespondajn kursojn
- * Eldonado de franclingva poresperanta bulteneto...

* Kaj aliaj aferoj, laŭ viaj sugestoj...



Dank'al helpo de legantoj de "Laŭte!" kaj abonantoj de la **Broŝurservo**, jam estis akiritaj elektronika tajpilo kaj ofsetilo. Ni nun proponas al vi partopreni en la ekipado de "Moulin de Beauville"...

La E-renkontiĝejo/restadejo

"Moulin de Beauville"

(Moulin de Carque Sac, F 47470 BEAUVILLE)

... konsistas el 8-hektara bieno kun pluraj konstruaĵoj apartenanta al la prizorgantoj de "Laŭte!" kaj "SAT-Broŝurservo", kaj kiun ili deziras disponigi al la geamikoj de L!, de la Amika Reto de SAT, de amikoj de Mondhejmo, kaj por similaj afinecaj amikoj, eĉ komencantoj, kiuj povos tie praktike eklerni esperanton.

La konstruaĵoj, en februaro 1989, konsistas el la **muelejo** mem kun 3 niveloj : teretaĝo + subterasejo, unua etaĝo + teraso, subtegmentejo. Teretaĝe troviĝas nun : necesejo, kuirforno, telerlavloko, fridŝrankoj, ŝrankoj kun manĝilaro... Sub la teraso eblas manĝi kaj kunveni ekde printempo. **Projekto** : duŝoj, tualetejo.

Unua etaĝo : 4 ĉambroj (manĝoĉambro, 3 dormĉambroj, 1 kameno, krano). **Projekto** : necesejo.

Subtegmentejo : en nia projekto, utilos kiel dormejo. Necesas izoli la tegmenton, fiksi la planko kaj vandojn.

La **kunvensalono** (ĉ. 60 m²) situas teretaĝe de apuda konstruaĵo. Tie eblas hejti per lignoforno. **Projekto** : instalii pli efikan kamenon kaj tie loki la eldonejon.

Sur la unua etaĝo : nun uzebla kiel provizora dormejo. Estontece, ĝi estos la loĝejo de la prizorgantoj, kun necesejo, kaj tualetejo. De tie eblas atingi la unuan etaĝon de la muelejo.

Granda konstruaĵo apude, rande de la korto, utilas nun kiel deponejo. **Projekto** : laborejo kun deponejo por materialoj kaj iloj.

La tereno : Laŭlonge de la rivereto (ĉ. 1-kilometron longa) eblas kampadi per tendoj aŭ ruldomoj. **Projekto** : aldoni duŝon kaj tualetejon kontraŭ la ekstera muro de la muelejo por la tendumantoj.

Aliaj eblecoj : ĝardenado, preparado de hejtligno (granda kvanto da tiucele uzebaj arboj), plantado de fruktarboj, botanika ĝardeno, ktp, ktp.

Financado por la ekipado de la renkontiĝejo :

Helpo per mono kaj laboro estas bonvena. Mondonacoj, kadre de la asocio, estos kvitancitaj en Laŭte! kaj registritaj sur de ĉiuj konsultebla libro. Tiu mono utilos ekskluzive por de ĉiuj uzebaj aferoj. Okaze de malfondo de la asocio aŭ nefunkciado de la restadejo, ĉiuj akiritaj estos transdonendaj al alia E-asocio.

Infompetojn, donacojn, ktp, — al —

Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque-Timbaut
poŝtkonto : 3371 74 M Bordeaux

ĈIES VOĈO

Noto de la red. : Pro respekto al la deziro de la verkinto, la ĉi-posta artikolo aperas senŝanĝe, t.e. kun "kelkaj ankoraŭ strangaspektaj vortoj: temas i.a. pri la neologismoj *ant, *at, *per esti, kaj *kaŭ, kaj pri la nekutimaj sed laŭ-Fundamentaj ante, ate, tempsame, el de, sendatis, periĝanto, plenlunplenaj kaj simortigis." (Inter citiloj estas la vortoj de la verkinto mem).

Marcelo Leereveld :

Mia seniluziiĝo pri Esperanto,
ne pri S.A.T.

Post duonjarcento da uzado ante Esperanton, mi nun konscias, ke la lingvo ne plu estos la plej utila kaj la plej adoptinda. Mi ankoraŭ ne trovis pli ĝustan lingvon artefaritan, sed espereble ĝi fariĝos, eble pro nova "invento", aŭ pro adaptigo ante Esperanton al komputera uzado.

Mia seniluziiĝo aperis ne pro malkontento pri la laboro kaj la laboraĵo de Zamenhof, sed pro la fuŝado ante la lingvon ate de la "Esperantistaro". Tiu fuŝado konsistas precipe en la sekvantaj traktadoj :

- 1) La tre granda plimulto de la Esperantistoj nur lernas la lingvon, eble serioze traktante la Esperantismon, sed ne Esperanton, kontentaj pri mezeca scipoveto ante la lingvon.
- 2) La animfacilo de la multaj, kelkfoje bonegaj kaj labor-egantaj, Esperanto-gramatikistoj en siaj traktadoj ante la Esperanto-sintakson kaj -vortfaradon kreantaj aŭ sankciantaj uzajn kiajn
 - a) la multaj nenecesaj neologismoj, tempsame kiel la manko at kaj nefarado ant tre multaj ankoraŭ ne iniciatitaj eblaj vortkunmetaĵoj;
 - b) la ekscesa kaj naŭziga (ĉar kontraŭ la aglutina spi-

- rito de Esperanto) nenecesa uzado ante la divid-
strekon;
- c) la maniero fari geografiajn nomojn tute kontraŭajn al la spirito kaj logiko de Esperanto (multaj dekoj da tiaj);
- ĉ) la uzado ante "vi" en la singularo;
- d) la malobeo ante la regulon, ke ĉe kunmetitaj vortoj la unua parto determinas la duan parton (= la radiko), ekz. en "disde, porvivo, ĉirkaŭurba, senpova, bel-aspekta";
- e) uzado ante vortojn kiaj "senforta, grandkuraĝa, (in-versa vortefiko), ekde, perlabori, facilanima, aliu, okulvitroj, fare de, belknabino, centjaro, en ĉi domo, ĵeti elen", kiuj havas alian signifon ol kiu estas en la menso de la uzantoj;
- f) uzado ante vortojn kiaj "peri, peranto, far, subiĝi, sci-igi, ellabori, okaze de, manke de, de sub", kiuj logike kaj Esperantologie signifas ekzakte la kontraŭon de kio estas en la menso de la uzantoj;
- g) uzado ante "de" en malsamaj signifoj, kie aliaj prepozicioj (NE la stulta "far") haveblas, kiel en jena artefarita kombinaĵo de suplementoj : "la formetado de la rubo de la loĝantoj de la urbo de siaj domoj" (= "la formetado ante la rubon (aŭ : ant la rubo) ate de (aŭ: at) la loĝantoj de la urbo el de (aŭ: deel) siaj domoj") ;
- ĝ) pluraj aliaj misformadoj.

Kvankam la logiko ne estu la sola determinanto de la gramatiko de Esperanto, tiun logikon nun anstataŭas dilettantismo kaj la (intenca kaj malklera) neregulismo. Tiu ĉi-supre menciita ekstro de mallogikaĵoj kaŭzas ankaŭ, ke estos multe pli malfacila adapti Esperanton por komputeroj.

*

Malsimila estas mia sentrilato al tiu alia el miaj idealeroj: S.A.T. Dum mia vivo mi havis plurajn akrajn batalojn, inkluzive eksigojn, kun la nederlanda F.L.E. kaj poste kun la aŭstralia A.E.A., sed neniam kun S.A.T. aŭ ĝiaj funkciuloj aŭ ĝia funkcioniero aŭ kun ĝia gazetredaktado. Mi neniam dubis pri la neceso, valoro, kaj ĝusteco de S.A.T.; mi trovas ĝin unika kaj civiliza.

Mi eklernis Esperanton en 1933 (15-jaraĝa) kaj estis SAT-ano sen interrompo el 1934 ĝis nun. Mia unua kon-

greso estis en 1935 en Parizo, kies du elstarajoj por mi, kiel junulo, estis la efemera apero sur la podion ate de Lanti, por sin defendi kontraŭ bolŝevistaj atakoj en la kongreso, kaj, dum alia laborkunsido, la pistolpafado ate de bulgara partoprenanto. La sekvantan jaron mi pasigis kvin monatojn en Francio, ĉirkaŭe trabiciklante la landon kaj renkontante multajn SAT-anojn, nun nevivantajn, kaj ankaŭ Zamenhofes filinon Lidia (ĉe S-ro Boirac en Liono). En Marsejlo mi ricevis permesilon por eniri Hispanion por tie batali kontraŭ la sekrete de Francio kaj Britio kaj malferme de Hitler kaj Mussolini helpataj faŝistoj, sed ĉe la limo oni ne plu allasis libervolajn helpantojn. En la franca sudokcidento mi restis kelkan tempon en de Karlo Vigier starigita kolonieto de vegetaraj nudistaj Esperantistoj: dum la plenlunplenaj noktoj (la ĉirkaŭaj kamparanoj dormis!) dancis nudaj ni, inter kiuj k-dino Magdaleno kiu poste simortigis pro malpermeso eniri Hispanion celante kontraŭbatali la faŝismon. Reveninte en Nederlando mi srarigis la Frakcion de Konsilantar-Komunistoj kaj prizorgis, antaŭ- kaj postmilita, la eldonadon ante ĝian monatan gazeton "Klasbatalo". Samtempe, precipe dum kongresoj kaj dum restadoj en Parizo, mi pli bone konatiĝis kun membroj kiaj Piron, Bartelmes, Bannier, Glodo, Glodino (mi ĝuis gastigi ĉe ŝi antaŭ kvar jaroj), Cagnard, Berté, Miquet. Mi memoras doni lekcion antaŭ kongresanaro kaj malpost k-do Waringhien. Mi memoras vojaĝi, tuj malpost la milito, al la kongreso en Kopenhago per aŭtobuso, kies sola veturigisto devis preskaŭ senripeze veturigi el mateno ĝis alveno en Kopenhago je la 9-a vespere, horon post la kongreskomenciĝo kiun, pro danradia dissendo, ni tamen povis sekvi en la veturanta aŭtobuso. Sed dum la lastaj kvar de siaj dekdu horoj da vojaĝado la veturigisto devis konstante vekati de interŝanĝantaj kongresontoj sidantaj apud li. Ni alvenis malfrue, ĉar dum la vojaĝo okazis du tempoperdoj : unu estis pro riparota paneo mekanika, la alia ĉar ĉe la nederlandgermana limo la naziistaj doganistoj volis retrosendi judan kamaradon en la aŭtobuso, ĉar ili trovis en lia pakaĵo komunistan ĵurnalon; feliĉe, germanparolanta k-do sukcesis, post longa petegado, persvadi la doganistojn gazetkonfiskantajn tralasi nian judan kamaradon. Mi memoras vojaĝi, tuj post la milito, per vagonaro al la kongreso en Aarhus, Danio, kaj, haltante en la stacidomo en Hamburgo,

renkonti plurajn hamburgajn esperantistojn, kiuj pro ankoraŭ aliancana okupado milita ne rajtis akcepti el de ni donacojn kaj manĝaĵojn, da kiuj ni jam havis sufiĉajn; unu el la esperantistoj (la polico forĉasis ilin post mallonga tempo ĉar unu akceptis donacon) estis juna k-do Volo Gueltling, kiu multajn (dekkvin aŭ dudek?) jarojn poste fariĝis SAT-periĝanto por Aŭstralio. Intertempe la frakcia organo "Klasbatalo" (ekzempleroj nun ankoraŭ videblas en biblioteko en Budapeŝto) bone florumis kaj sendatis ĉien en la mondo, eĉ en la t.n. komunistajn landojn, malgraŭ la akre kontraŭbolŝevika idearo de la gazeto. En 1951 mi kun familio enmigris en Aŭstralion, starigis post du jaroj Esperanto-klubon kaj kongreson en Hobarto (Tasmanio), kaj poste enkondukis la lingvon en lernejojn kaj en la oficialajn postlernejajn ekzamenojn. Mi povis servi S.A.T. per esti multjare Periĝanto kaj poste, estante vicprezidanto kaj prezidanto de A.E.A., verbante plurajn novajn anojn. Sed la varbado por S.A.T. ne estas facila en Aŭstralio, pro la malmulteco de la Esperantistoj.

Nun, emerito, mi ne plu havas multan tempon, kaj okupiĝas pri Esperanto instruante nur unu klason, de progresintoj.

Post kvindek jaroj da SAT-membreco kaj post 35-jara nevizito ante SAT-kongreson mi estus emocie ĝuanta partopreni en la ĉijara kongreso en Brazilo, sed la vojaĝkostoj el Aŭstralio tien estas tre altaj, multe pli ol por iri al Eŭropo. Sed mi esperas sekvi pliajn jarojn da S.A.T. kaj kongreson aliie.

Marcelo Leereveld
Matrikulo 19.426.

P.S. al Punkto 2b : Tiuj, kiuj pensas ke Esperantistoj ne kapablas kaŭ ne bezonas esti sufiĉe kleraj por rapide rekoni longajn kunmetitajn vortojn sen la naŭzigaj dividstrektoj, rigardu la sekvantajn germanajn vortojn el tri (1), kvin (4) kaj ses (3) elementoj (ilin mi renkontis sur du paĝoj de nova libro pri la germanaj naturkonservuloj) :

Kernenergiediskussion, Meinungsbildungsprozess, Strafrechtsänderungesetz, Technologiefolgenabschätzung, Wachstumsvorstellungen, Gleichbehandlungsgrundsatz, Bundesverfassungsgericht, Wiederaufbereitungsanlage.

P.S. al Punkto 2a : Ĉiu lingvo havas certajn fizikajn karakterizaĵojn kompare kun aliaj. Unu tia el aglutinaj lingvoj estas la ofta apero de kelkaj afiksoj (la parolantoj de tia sia lingvo ĝenerale ne rimarkas tion).

Tio estas natura fenomeno, balancigita de aliaj aĉaĵoj. Tiuj, kiuj necese grumblas pri la relativa multo de mal-vortoj en Esperanto rigardu la sekvantan malajlingvan frazon kun la prefikso "pe-" (5x) kaj kun la sufikso "-an" (5x) kiun (ĝi ne estis tia intence!) mi trovis sur anonctabulo en la urbo Pandeglang en Javo, Indonezio: Badan Pembinaan Pendidikan Pelaksanaan Pedoman Penghayatan dan Pengamalan Pancasila, Pandeglang.

M.L.

PRI NOV-KALÉDONIO

Mi respondas la artikolon de B. AUNIS pri Nov-Kaledonio (L! 78), kaj ŝatus koni la opinion de aliaj legantoj de Laŭte! pri tiu temo.

Ŝajnas al mi grave, ke esperantisto komparas Kanakojn kaj francajn maldekstrulojn kun faŝisto LE PEN.

Laŭ miaj scioj, loĝantoj de Nov-Kaledonio ne petis, ke Francoj iru ĉe ilin kaj traktu ilin same kiel sklavojn. Kiam ili petis iom pli da bonkvalita vivo, oni ne aŭdis ilin. Do oni ne devas miri, ke, finfine, ili ribelas. Tie, same kiel aliloke, en alia tempo, oni ne diskutis, sed oni sendis soldatojn por "pacigi" la sovaĝulojn. Tio evidentiĝas la fakton, ke se Kanakoj estas sovaĝuloj, Francio ne plenumis la taskon por evoluigi ilin.

La situacio en Bretonio, Alzaco, Korsikio, ŝajnas al mi tute malsama. Mi atendas, ke oni pli bone klarigu al mi por ŝanĝi mian opinion.

Gisèle GIZARD

ABSOLUTAJ KALUMNIOJ

Ĉiam la inteligentaj politikuloj komprenis la neceson diri ĉion kaj ĝian malon: unuj asertoj estas farataj por komprenigi al la partianoj, kiel ili agu; aliaj celas trankviligi la kredeman popolon. Inter la du mondmilitoj Hitler tre klare sciigis sian programon per **Mein Kampf**, sed malpermesis, ke tiu libro estu tradukita al la franca, kaj multobligis la pacemajn deklarojn. Tiel naivuloj povis sincere deklari post atako kontraŭ la naziismo: "La artikolo de s-ro X... pri Germanio estas absoluta kalumnio..." kaj ili citis parolojn de Hitler mem. Dum la Alĝeria

milito, la maldekstra gazetaro senĉese ripetis al la Francoj loĝantaj tie, ke ili timu nenion: "La aserto, ke vi estos elpelitaj, estas absoluta kalumnio..." kaj mi memoras, ke Ferhat Abbas, tiama ĉefo de la ribelo, promesis tion franclingve en elsendo destinita al ili. Tamen en arablingvaj ĵurnaloj oni parolis alie: la sekvo montris, kie estis la vero. En Alzaco mem mi havis la okazon paroli kun tre estimindaj separatistoj, kiuj diris al mi: "Viaj opinioj pri la dulingvismo (kies fervora partiano mi estas) ŝajnas tre interesaj, sed, sincerparole, la dulingvismo ne estas nia celo: ni deziras, ke en Alzaco oni parolu nur la Germanan; tamen ni ja estas devigataj aspekti kiel subtenantoj de la dulingvismo por ne maltrankviligi la publikon. - Vi pravas, mi respondis, tiel la stultuloj indigne ekkrios, ke oni "absolute kalumnias" vin, kiam vi senpripense diros la veron."

Tial min ne povas indignigi la respondo de sinjoro L. ANGEVIN (L!79), kiu skribas, "La artikolo de Bernard AUNIS "Malkoloniado" estas absoluta kalumnio"; li daŭrigas longan tradicion kaj mi trovas en lia naivo tiom da infana freŝo, ke ĝi preskaŭ kortuŝas min.

Bernard AUNIS

Nia gasto : **Alexandre ROUSSET**, INTERLAND-manaĝisto.

"...Leginte la ĉefan temon de via baldaŭa n^o, mi kunsendas al vi artikolon pri la ekonomia eksperimento por E-o en la firmao INTERLAND, kiun mi manaĝas nune..." (letero de 1988/12/03.)

E-o, la INTERLAND-a lingvo

Antaŭ kelkaj monatoj, kiel vi certe scias, naskiĝis en Francia serv-entrepreno por doni ekonomiajn uzojn al la "neprofit-cela lingvo" E-o. Tiu firmao, nomita INTERLAND, ĉefe ofertas kompletan instruon de E-o al la plurnaciaj firmaoj volantaj optimumigi kaj priŝpari sian internan komunikon inter malsamlingvaj laboristoj kaj teknikistoj (nun kondamnataj lernadi kaj relerni la anglan aŭ alian tradician kaj malfacilan lingvon). Aliaj servoj INTERLANDaj koncernas la tradukadon, la trovon de eksterfranciaj partneroj por francaj firmaetoj kun eksport-bezonoj, ktp...

Nun, nia juna organizo povas fari unuan bilancon de sia

lanĉiĝo, havinte sian unuan klienton. Kaj tiu bilanco ne pruvas multan adekvatecon de E-o kun la ekonomia mondo: - la monkvanto kaj la tempkvanto necesaj por dissendi leterprezentojn de niaj servoj (pli ol 1000-ope por profiti reduktion en la poŝta tarifo) apenaŭ kompenŝiĝas per la mono gajnata per niaj kontraktoj ;

- rezulte, nur en januaro 1989 ni povos dungi nian unuan salajrulon, kaj mi mem (kvankam direktoro de tiu firmao unika siáspece) restis 11 monatojn sen salajro ;

- ja nin financis kvardeko da francaj e-istoj, sed nia strebo pligrandigi la INTERLANDan akciularon (per reklamo en la junia UEA-revuo kaj dum la UK '88) koliziis kontraŭ la malentuziasmon de niaj nefrancaj amikoj... Kelkaj ne kontentis pri niaj atingiĝoj, kelkaj pri niaj celoj, aliaj eĉ ne pagis la dosieron senditan al ĉiu petinto!!

Sed ni ne volas rubigi la tutan e-ismon per tro longa listo de la malhelpaĵoj de "e-lingvanoj" al la unua e-ista firmao.

Frue aŭ malfrue, ĉiuj komprenos ke la unika eblo por E-o enradikiĝi en la socion estas pruvi ĝian ekonomian utilecon al tiu socio ; tial, INTERLAND firme pluigas sian agadon kaj invitas ĉiujn real-konsciajn e-istojn iĝi INTERLAND-partneroj (kontaktante ĝin).

Alexandre ROUSSET (INTERLANDa manaĝisto).

INTERLAND, 4 rue de la Monnaie, F-30400 Villeneuve-lès-Avignon

ALVOKO EL HUNGARIO (vd. ankaŭ L!78, p.43-44)

El Transilvanio la rumana ŝtato devigas la hungarajn gelernantojn translokiĝi en rumanajn distriktojn, forlasante la gepatrojn, la hungarajn urbojn, vilaĝojn, kaj ili devas lerni en tute rumanaj lokoj, kie ne troviĝas hungaroj. En iliajn lokojn alvenis jam la rumanaj gelernantoj. T.e. de la distrikto Hargita 1600 mezlernejanoj, de la tute hungaraj vilaĝoj : Korond, Lövéte, Etéd, Siménfalva, Ditró, Csomafalva, Bélbori, Tölgyes, Maroshéviz, Gyergyószentmiklós, ktp., devas forveturi en la malproksimajn,

"historiajn rumanajn" lokojn de Filipești de Paduéra, Turnu Severin, Rimnicu-Vilcea, Tirgoviste, Calarasi, Medgidia, Bolintini de Valén, ktp., kie sen siaj gepatroj ili, laŭ la volo de la rumana ŝtato, fariĝos rumanoj, forgesonte siajn gepatrojn kaj la gepatran lingvon!

Alvenis jam la rumanaj en iliajn lokojn, en la mezlern-
ejoj 1600 mezlernejoj el tute rumanaj distriktoj : Lalo-
mita, Neamt kaj Bákó, kiuj estas rumanaj. La hungaraj
gepatroj plejparte ne permesas forveturigi la gefilojn, tiel
tiuj ne plu povas lerni, kaj ili atendas la minacantan
punadon. Atentu : oni aliloken deliveradas la lernantojn
kaj la lernantinojn!

Bonvolu protesti ĉe la Unuiĝintaj Nacioj! Bonvolu instigi
ankaŭ viajn ŝtatestrojn al la protestado! URĜAS !

La Federacio Langvedoko-Rusiljono informas pri :

* Semajnfino en Lézignan-Corbières (11), la 15an kaj 16an de Aprilo
por la federacia kongreso. Loko: MJC. Malmultekostaj loĝeblecoj por
gejunuloj.

* Lingvo-ŝtaĝo apud Agde (34), de la 3a ĝis la 7a de Majo. Ebleco pli-
longigi la restadon ĝis la 10a de Majo.

* Rondvojaĝo tra Britujo post la UK de Brighton (de la 5a ĝis la 27a
de Aŭgusto) por aŭtomobilistoj.

Informas : la sekretario de la federacio, 4 rue Docteur Rives
66000 PERPIGNAN. Tel: 68 55 51 77

12a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO

La Kultura Centro de Montpellier proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian
scipovon pri esperanto de la 16a ĝis la 23a de septembro 1989. Profitu,
samtempe trapasi agrablajn feriojn en marborda ripoza loko, kadre de
agrabla familia domo (familia domo "Le Lazaret", SETE), proksime de
Montpellier, Sud-Francio.

Ĉi tiun jaron la restado estos aparte interesa ĉar ni kalkulas pri multe
da alilandanaj partoprenantoj por krei vere internacian etoson.

Vi trovos plurajn nivelojn de E-aj kursoj kaj, ankaŭ... banadon en la
Mediterraneo, ekskursojn, belajn vesperkunvenojn kaj... bonan manĝaĵon.

Restadokosto kun tri manĝoj : 1050 FF aŭ 1155 FF por la tuta semajno
laŭ la elekto de unu aŭ dulita ĉambro. Ebleco tendumi proksime.

Aliĝo/Informo : ESPERANTO, 5 rue Dr. Roux, F 34000 MONTPELLIER

La domo taŭgas por rulseĝoj.



laŭtaj informoj

ESPERANTO EN LERNEJO

S.E.M. (Studgrupo Esperanta kaj Ma-
tematika) fondiĝis la 28an de aŭg.
1988. Ĝi funkcias ĉiun lernejan jaron.
Ĉi-jare ĝi agadas en la sino de la
liceo de GBENYEDZIKOPE (gbenied-
zikope), en la ĉefurbo LOME. Dank'
al mia peto, la lernejestro de tiu
liceo akceptis ke tia kurso okazu
en lia lernejo. La celo de la grupo

estas :

- Helpi al la lernantoj de la kvara klaso de mezgrada lern-
ejo prepari la finjaran ekzamenon, disponigante al ili krom-
ajn ekzercojn kaj klarigojn pri matematiko, tiu lernobjekto,
kiu malsukcesigas multajn.

- Enkonduki Esperanton en la lernejan tavolon.

La grupo konsistas el tuta klaso de tiu liceo (kvara klaso),
al kiu aldoniĝas lernantoj el aliaj lernejoj. Nun mi povas
kalkuli 46 lernemulojn, gvidatajn de mi kaj du respondec-
uloj elektitaj inter la kursnaoj :

- S-ro Koffi PETHOS : Respondeculo de la kursanoj,

- S-ro Mensah FOLLY-AGBONYITOR : Vic-Respondeculo.

La kurso okazas ĉiusabate, de la tria ĝis la kvina posttag-
meze.

Mi ne povas preterlasi la problemojn de miaj lernantoj,
la ĝeneralajn problemojn de Afriko. Multaj afrikanoj povus
fariĝi kleruloj, se ili havus la taŭgajn rimedojn. Ili tamen
havas la emon, sed kie trovi lernilojn, manĝaĵojn, ktp. ?
Tiuj ĉiam ekzistas kaj senĉese kaŭzas la demision ne-mem-
volan de la lernemuloj.

Problemoj ne povas sukcesigi iniciativon. Oni devas
solv(ig)i ilin. Tial mi alvokas ĉiujn samideanojn, por ke ili
partoprenu en la agado de S.E.M..

Por nia pluagado, ni bezonas lernilojn, kasedojn, bild-
kartojn, glumarkojn, gluetikedojn, revuojn, aparte ĉion,
kio povas interesi kaj kuraĝigi la kompatindulojn.

Niaj tujaj bezonaĵoj jenas :

- Kajeroj, skribiloj, kaj kretoj ;
- Lernolibroj. Mi elektas la libron "Junulkurso" (kun suplemento por la franclingvanoj)
- Vortar(et)oj Esperanto/Franca/Franca/Esperanto.
- Libroj matematikaj (franclingvaj) por la kvara klaso de mezgrada lernejo. Ankaŭ Matematikaj libretoj Esp-aj estos bonvenaj.

Ĉiuj helpemuloj direktu siajn kontribuojn al :
S.E.M. GBEGLO Koffi, B.P. 13169, Lomé-TOGO.

De la 12-a ĝis la 22-a de julio 1989, internacia Renkontiĝo de esperantistaj edukistoj (Freinet-pedagogio) okazos en STE-FOY-LA-GRANDE, inter Bordojo kaj Centra Montaro, Francio. Sin turni al :

Paul POISSON, 239 rue Victor Hugo,
F-37540 ST CYR SUR LOIRE, Francio.

EN HABÈRE POCHE

En aŭgusto sep membroj de nia grupo ĝirondia profite partoprenis en plensukcesa laborsemajno en Habère Poche. (renkonto organizita de S-ino Vierne kaj la grupo de Montpellier).

Bedaŭrinde, la vetero ne estis tiel bela kiel nia deziro por plene profiti ekskursojn en tiu mirinda regiono. Tamen, kiel pasintajn jarojn, ni povis ĝui la agrablan elson de esperanta medio kaj ĉefe provi esp-ebabili kun multaj eksterlandanoj : el Aŭstralio, Anglio, Germanio, Japanio, Jugoslavio, Brazilio, Hispanio kaj Vjetnamio. Evidente, ne forgesu ke ni bone laboris ankaŭ dank'al spertaj gvidantoj. Sed la grava novaĵo en tiu semajno venis de la partopreno de deko da skotaj infanoj de la regiono Dax-Mont de Marsan, kiuj eklernis esperanton kaj tendumis sur la apuda herbejo. Apartajn gratulojn al la plenkreskuloj, kiuj zorgis pri ili...
Certe tio estas ekzemplo por mediti kaj imiti.

Ĝis la venonta jaro en Sète!

Rose, el grupo "Esperanto-Gironde"

EN EYSINES (Ĝirondio)

La 30an de okt. 1988 la laika Amikaro akceptis Jorgos, kiu trapasis sian regionon, survoje al Paris.

Dum varma akcepto de la urbestro (deputito, ĝenerala konsiliano) Jorgos, akompanata de 8 geesperantistoj, klarigis la agadon de B.E.M.I.

Post fotografado sur Strato Esperanto, sekvis honorvino, donacita de la Laika Amikaro, kies fako ni estas.

La prezidantino de la Laika Amikaro petis senkulpigon pro vojaĝo. Partoprenis Simonne Bernard, vic-prezidantino, la sekretariino, deko da esperantistoj kaj diversaj ezinanoj, inter kiuj reprezentantoj de biciklaj asocioj.

Denove Jorgos klarigis la aferon por la ĉeestantoj, kiuj atente aŭskultis. Naskiĝis projektoj, ĉefe kun la biciklaj asocioj. Ili petis nin informi pri la venonta biciklado.

Loka radio "Iguanodon" intervjuis Jorgos, kaj ankaŭ ĵurnalo "Sud-Ouest". Ĉi-lasta raportis per granda artikolo kun fotoj. Komuna manĝo finis la vesperon, antaŭ meritata ripozo por la kuraĝa biciklanto.

Ni povis konstati, ke Jorgos plenumas imponan taskon pri organizado de la biciklado mem, kaj publikigo pri Esperanto ĉe ĵurnalistoj, radioelsendiloj, urbestroj, ktp...

Necesas granda sindonemo por fari tiun originalan agadon.

Tio konigas la gastigantajn grupojn. En Francio, post la radioelsendo ĉe France-Inter fare de H. Masson, manifestacioj pri biciklado tra Eŭropo por Esperanto kaj Ligo pri Homaj Rajtoj estas bone akceptitaj kaj permesas disvolvi la ideon de Universala Lingvo.

Pro tio ni tre dankas kaj gratulas Jorgos kaj la aliajn partoprenintojn al la biciklado.

Gisèle Gizard.

Vi ŝatas ESPERANTON ? Vi deziras ĝian DISVOLVADON ?
VI POVAS EGE HELPI NIN.

La Esperanta Kultura Centro de Montpeliero ĵus kreis sian propran perkorespondan kurson.

Ni bezonas RETON da PERANTOJ en ĉiuj lokoj de nia REGIONO.

Ĉu vi volas AGI kun NI ?

SAMIDEANOJ, JEN NIA METODO :

1e - Vi disdonu la "UNUAN RENDEVUON" (R.V.) de la "METODO KVAR" al la persono iomete interesata pri ESPERANTO. Sur tiu R.V., vi aldonu vian adreson.

2e - La persono plenigas kaj sendas al vi la R.V. Vi korektu kaj resendu ĝin rapide kun la DUA R.V., same pri la TRIA. KVARA, ktp, ĝis la NAŬA R.V.

"METODO KVAR" - (Kontakti, Varbi, Argumenti, Respondi) - PERFECTA TAŬGAS por allogi EK-KOMENCANTOJN, ĉar ĝi aspektas pli LUDO ol KURSO.

Tiu "UNUA RENDEVUO" AGAS kiel la LOGAĴO de la FIŜKAPTISTO.

Iom post iom, preskaŭ NEKONSCIE, kvazaŭ LUDANTE, la "lernanto" metas sian fingron en Esperanton.

Post la NAŬA R.V., la "lernanto" estas preta "ataki" en bona kondiĉo la "METODON 11", kiu estas vere perkoresponda kurso, kiun ni disdonas lecionon post leciono akompanata de EKZERCFOLIO kaj diversa stud-materialo.

Jam pli ol 120 geĉefantoj komencis partopreni niajn kursojn ; sed, multaj el ili loĝas en Afriko aŭ en aliaj regionoj de Francio.

Nun ni intencas disvolvi nian agadon en NIA PROPRA REGIONO por evidentaj kialoj. Se ĉiu el niaj "PERANTOJ" varbus kelkajn personojn, vi imagu la nombron, kiun ni povus atingi rapide.

Eble kelkaj el vi ne povas aŭ ne volas esti "PERANTO" ; tamen vi povas EGE kontribui al nia kreskado. KIEL ? Sufiĉas, ke en ĉiu okazo VI disdonu la UNUAN R.V. kun nia adreso. NI MEM prizorgos la korektadon kaj la resendon de la R.V. rekte al la interesato. Tiujn agantojn ni nomos "KORESPONDANTOJ".

PERANTOJ aŭ KORESPONDANTOJ NI BEZONAS VIN...

NI KALKULAS PRI VI :

Fakte ĉiu SAMIDEANO indas fariĝi la ĉi-supra FIŜKAPTISTO...!

BONVOLU SKRIBI aŭ TELEFONI al ni por proponi vian kunlaboradon kaj peti materialon aŭ pliajn informojn.

Ankaŭ plaĉus al ni ricevi viajn konsilojn kaj sugestojn.
NI MULTEGE ANTAŬDANKAS VIN. Bonvolu vin turni al :

ESPERANTO S/C CAYZAC
Res. Pic St Loup 171 Grand Mail
34080 Montpellier - Tel 67 75 37 65

Nia vivo en PRIVAS (Ardèche, Francio)

La 19an de oktobro '88 ni havis la ĝojon akcepti JORGOS revenantan de sia dua Eŭropa Biciklado. La loka ĵurnalo anoncis lian alvenon por la "Cyclo-club" de la urbo. La antaŭan tagon, en Aubenas, inter la akceptantoj estis Helène Martel, kiu multe ŝatas bicikli (iris en Finnlandon pasintsomere) kaj komencas lerni E-on kun ni por aktivi en B.E.M.I. Jorgos alvenis post 30-kilometra veturado sub pluvego, kiu ne forigis lian kuraĝon. Dum intervjuo en la urbodomo li longe rakontis pri "la Homraĵto je Rekta Komunikado" kaj ankaŭ pri sia granda aventuro en Hungario, kie li eniris kun unu biciklo kaj foriris kun tri, sed tie perdis ĉiujn dosierojn... Tio espereble ne plu okazos dank'al la ĵus-naskita franclingva asocio "Amis des Cyclo-Espérantistes", kiun plej multaj aliĝu por apogi la kuraĝon de la sekvantoj.

Tiuj vizitoj informas pli-malpli la loĝantojn de la urboj trapasitaj, kiam la oficialuloj kaj la gazetoj estas informitaj. Estontece ni esperas interesi la "Domon por Ĉiuj" (M.J.C.).

P. BASCOU

SALONO en PARIZO (de la 4a ĝis la 12a de marto)

"ALIMANIÈRE VIVI KAJ LABORI" (vd. L! 79)

Spaco Austerlitz, 30 Kajo Austerlitz, Parizo 13-a

Informas : Emile MAS, Le Fraysse, F-46170 Castelnau-Montratier

Poŝtkonto : Nicole Déjean, Esperanto-Budo, CCP n°227013 V Toulouse

PERIGORDA E-GRUPO

La 15an de decembro okazis en Trélissac la ĝenerala asembleo de la Perigorda E-Grupo kun 18 partoprenantoj. La Grupo, post penso al nia amiko Jacques MAURIANGE, kiu forpasis en la monato julio, bilancis la pasintan jaron : la kurso pludaŭris kun 5 novaj lernantoj. Jorgos trapasis departementon Dordonjo kaj estis akceptita en Périgueux (artikoloj aperis en lokaj gazetoj kaj estis komuniko ĉe Radio).

La Grupo regule partoprenis la staĝojn en Artigues. Budoj pri Esp-o estis prezentitaj ĉe la Pikniko por Paco de la loka Bahaa grupo kaj ĉe la biologia bazararo. La 30an de aprilo estis inaŭgurata en Cubjac la "Ponteto de Esperanto" kun ekspozicio pri Esp-o, festo kun partopreno de la urbestro kaj de la tiea loĝantaro.

Jen kelkaj projektoj por la venonta jaro :

- starigo de kurso en Razac (vilaĝo apud Périgueux)
- prelego ĉe Universitato de la libera tempo
- renkontiĝo kun la grupo de LE FLEIX (24)
- ekspozicio pri Esperanto
- informado ĉe teknika liceo...

Groupe Espérantiste Périgourdin (Perigorda E-Grupo)

32 rue Paul Dumas, 24000 PERIGUEUX. Tel : 53 08 68 11

En EYSINES (Ĝirondio) - Post la elsendo de France-Inter dum aŭgusto ni multe propagandis : aŭdiogluado, artikoloj en diversaj gazetoj, informoj pri la kursoj per privata radio, budoj en bazararo.

Novaj gelernantoj vizitadis la kursojn kadre de la Laika Amikaro. Ĉiusemajne okazas tri nivelaj kursoj, entute 15 personoj. 20 personoj aliĝas al la grupo. Tri kamaradinoj regule prizorgas E-kursojn por la privata radio de la skoltaj en Blanquefort (ĉirkaŭaĵo de Bordojo).

Bonan jaron al vi ĉiuj.

Ginette



LA NOVA KASEDO DE NIKOLIN' !

"Julo", ja pagana festo "rekuperita" de la kristana religio, estas nun redonita al la tuta homaro en verda vesto.

Lingve perfekta, bone registrita, kun bela muzikista akompano, enhave varia, jen emocia, jen ĝojdona - tia estas la jarfina donaco, kiun la esperantistaro ricevas de nia kara NIKOLIN' kun ŝia nova kasedo : "**Jula Lando**". 12 pecoj konsistigas tiun sonjuvelon, en kiu ni malkovras diverslandajn julajn kantojn, iujn tre konatajn, aliajn ne (almenaŭ de mi!). De mira remalkovro al rava surprizo ni tro rapide atingas "La jaro baldaŭ for" (laŭ la konata ario de "Adiaŭa kanto"), kiu lasas al ni grandan deziron aŭdi plu kaj pli. Ja entuziasmo kreskas dum aŭdado kaj reaŭdado.

Kion proponos NIKOLIN' por ankoraŭ ĝojigi nin? Ĉu kasedon por infanoj, kvazaŭ jam enkondukitan de tiu ĉi? La estonteco montros tion al ni, sed ni fide atendu : la neelĉerpeblan trezoron de NIKOLIN' ni ĵus komencis malkovri kaj mire ĝui...

"**Jula Lando**" estas mendebla ĉe SAT-Broŝurservo : 70 FF (la franko estas enkalkulita). La unua : "**Invito al**

Baldaŭ venos Kristnasko - Kobolda julkanto - Julaj tintoj - Jula ario - Tintilet' - Natur' en vintira vesto - La julkanto de Silvia - Stela nokt' - Malgranda abieto - En la tago de la jul' - Blanka Kristnasko - Afrika julkanto - La jaro baldaŭ for. (Bendofako de LF-koop, Svislando - 1988).

ĝojo" restas disponebla (sampreze) ankaŭ ĉe SAT-BS. Prefere mendu okaze de broŝurmendo, por pli sekura pako. Kribo.

"PARADIZO TUJ" FINFINE SAVITA !

Iam aperis alvoko por helpi kdon R. Damarin elsaviasian bienon kaj ekologian entreprenon, nome "Paradizo Tuj"; kaj tiucele starigis asocio. Dank'al multaj pozitivaj respondoj kaj benefikaj helpoj, ĝi finfine estas elsavita : La supre menciita Asocio oficiale kaj definitive ĝin akiris la 14an de septembro 1988.

Al ĉiuj helpintoj plej elkoran dankon!...

Nun restas alia tasko : pluvivigi la projekton; necesas individuaj aŭ paraj kunlaborantoj por tion plenumadi. Iu el la ĉefaj celoj estas dumviva akcepto de infanoj : ĉu eblas resti inerta sciante, ke ĉiutage tra la mondo 14 000 da ili mortas en plej kompleta senhaveco?! Espereble kelkaj el vi estas pretaj aktive partopreni en tia projekto ekologie laborante kaj vivante. Aŭ subtenante per aliĝo al la Asocio (minimume 50 FF jare); ankaŭ per financa kontribuo (poŝtkonto : Asocio Paradizo Tuj - n° 7291 67 S, Bordeaux). Ĉi-sube, detaloj pri la projekto :

PROJEKTO "PARADIZO TUJ"

(La bieno situas en regiono destinita por agrikulturo)

- laŭ modelo de mikrosocieto senreligia, liberecana, aŭtonoma, bazita sur individuo, interakordo kaj komuneco.
- vegetalanoj, vegetaranoj, nefumantoj.
- memdecida naskiĝokvanto kaj prefere vivdaŭra infanakceptado.
- komuna kaso.
- eksteraj prestaĵoj de pagitaj labortaskoj socie utilaj, dividitaj inter ĉiuj.
- interna produktado neprofitcele vendota; kromaĵoj disdonataj al tiuj, kiuj havas help-mensostaton.
- formadstaĝoj kaj instruadoj, kun partopreno en la elspezoj.
- ebleco de surloka plivastiĝo per aĉeto de parceloj.
- kunligado kaj interŝanĝoj kun aliaj komunumoj sen iu ajn prozelitismo filozofia, politika, religia, k.a...
- celado al beleco kaj kvalito de la laboro.
- interpersona libereco kun respekto al aliuloj.
- uzado de nepoluciantaj teknikoj (besta tirado, sunenergio, metano, aerogenerato...)
- strebado al plejebla komforteco per minimuma altudita laboro.

- disvolvado de "LOISAIL" (laboro-libertempo).
 - ĉiuj decidoj koncernantaj la komunumon estas **unanime deciditaj**.
René DAMARIN : "Paradizo Tuj" - Le Barbut - F 33850 LEOGNAN
 Tel. 56 89 07 74.

ZAMENHOF-TAGO en MONTAUBAN

Kiel kutime, regionaj e-istoj kunvenas okaze de la Zamenhofa tago ; ĉi-jare 34 sudokcidentanoj kunvenis en Montauban, en tre konvena loko, por tiu amikeca, familieca renkontiĝo.

Krom la plezuro kune ĉeesti, ni debatis pri la Homrajtoj, tre aktuala temo, tiujn ĉi tagojn! Tre vigle la 13 alvenintoj, sabaton vespere, traktis la temon. Dimanĉon posttagmeze, la ĉeestantoj ariĝis en tri grupoj por diskuti pri la disvastigado de Esperanto.

Ŝajnas, ke la plimulto plene ĝuis la restadon ; kompreneble, tio varmigas la koron de la prizorgintoj. Ĝis venonta jaro!... Kie ?

Suzanne Calas

Kiel disvastigi Esperanton ?

Kiel konservi gelnantojn pri Esperanto ?

Tiu ĉi temo ne estas nova sed daŭre aktuala. Jen mallonga resumo.

1a grupo : Ili proponas organizadon de "Marŝo" de Bruselo ĝis Strasburgo en 1990 por influu pri Esp-o, kontakti oficialajn instancojn, por peti instruadon de Esperanto, kiel fakultativa lingvo, en lernejoj.

2a grupo : Informi pri Esperanto, konigi la internacian lingvon en ĉiuj medioj : ANPE (agentejo por senlaboruloj), radio-elsendoj, gazetoj, turism-oficejoj ; uzi ĉiujn lokajn amaskomunikilojn.

3a grupo : - Ne miksi lernadon de Esperanto kaj aktivulismo - sin organizi por starigi kursojn, kunvenojn - sin turni al gejunuloj kiel responsaj personoj, rifuzi ilian "enregimentigon" - Prezenti Esperanton kiel rimedon por pli bone vivi, koni, fari alion (ekzemple Rock, kolektadoj, vojaĝoj...) - Modernigi la propagandilojn, diversigi ilin laŭ la celoj, la trafitaj publikoj - Kunlabori kun la diversaj E-asocioj, grupoj, por ŝpari tempon kaj monon, kaj fortojn.

Ebleco : Ni (la Tuluza kaj Montalbana grupoj) provos organizi labor-semajnfinojn pri lernado de Esperanto por komencantoj el la regiono.

N.D.

Bilanco de SAT-Broŝurservo por 1988

Vendoj - Provizoj : 32091,16	Eldonkostoj : 14419,00
Donacoj : 1000,00	Afranko : 1863,00
Intereso ŝparkasa : 2015,80	Diversaĵoj
Diversaĵoj : 28,00	(ĉefe, transĝiroj al L!) 6575,19
<u>Enspezoj</u> : 35134,96	<u>Elspezoj</u> : 22857,19
Jara saldo : + 12277,77	

Antaŭa saldo fine de 1987 : 28053,83. Nun en la kaso : 40331,60 FF

Broŝurabonantaro : 114 (111 en 1987). Ĉi-riate lamas la BS, ĉar pro la malmulteco de la abonantaro ne eblas garantii senprobleman publikigon de literaturaĵoj.

En 1988, samkiel la pasintajn jarojn, plej bone vendiĝis la prilingvaj broŝuroj (Kiel diri, Grammaire & Espéranto, Les Seize Règles...). Tiu bona disvendado ebligas de tempo al tempo publikigi valorajn, sed ne tiel facile vendeblajn, literaturaĵojn, plej ofte tradukitajn.

En 1989 kaj venontaj jaroj, povus esti tre ambicia eldonplano, sed la efektivigo dependas de du faktoroj : plimultigo de la broŝurabonantoj, disponebleco de la eldonanto. Nur kiam mi forlasos la profesion okupon (tiun decidon mi ankoraŭ ne povas fari) eblos disvolvi servon, kiu postulas multe da sindediĉo, kaj eble pli seriozan traktadon de la disvendo-fako, ol mi kapablas fari.

Mi povas nur instigi vin ĉiujn helpi min diskonigi la broŝurojn, ekzemple zorgante mem pri disvendado de stoketo, laŭ viaj emo kaj ebleco.

Al ĉiuj gefideluloj de la B.S., al tiuj, kiuj helpis surloke por la broŝurigo, plej varme amikan dankon.

Kribo

El la eldonprojektoj : Aldoniĝas al la jam en L! 79 menciitaj projektoj : **Rakontoj el Kolima** (Varlam Ŝalamov, trad. Oksana, K.Long) - **La Ŝtona Gasto** (teatraĵo de M. Duc Goninaz). La unua eldono, fare de La Kancerkliniko, estis nur 100-ekzemplera. Tiu ĉi aperos en venonta n-ro de L!, kaj estos havebla ankaŭ aparte, tiel multe pli da legemuloj povos ĝin frandi...

Bilanco de Laŭte! por 1988

Abonoj + donacoj : 15152,37	Jara saldo : + 2815,67
Eldonkostoj : 9194,50	Saldo fine de 1987 : 8492,56
Afranko : 3142,20	Nun en la kaso : FF 11308,23

La kaso do bonfartas kaj povos ebligi la aperigon de almenaŭ 5 duoblaj n-roj en 1989, se necesigos tion la amplekso de la artikolaj kontribuoj.

Bilancio de Laŭte! (daŭrigo)

Abonantaro : 411 abonoj, la ĝis nun plej alta nombro (kresko + 3%). La procento de eksterfranciaj abonoj regule kreskas de la komenco, nun 40%, dum la abonantaro restas stabila en Francio. 32 personoj ricevis L!-n dank'al donacoj de Laŭtuloj.

Enhavo : 324 paĝoj en 1988 en 5 n-roj (4 duoblaj plus 1 "normala"). Kontribuis 65 personoj (76 en 1987).

Varbado : Ĉar nia gazeto fariĝas pli kaj pli fama kaj ŝatata, eblas unuafoje peti de ĉiu abonanto speciale en 1989 klopodi varbi novajn abonantojn. Estas loko por ĉ. 40 pliaj. Kvankam tio donos ankoraŭ iom pli da laboro, tiu renovigo estas necesa por ke L! restu malfermita al kiel eble plej diversaj legemuloj/kontribuantoj, kiuj interŝanĝe riĉigu unu la aliajn. Sendu do adresojn de amikoj aŭ konatoj viaj, mi sendos specimeno(j)n. Aŭ ne hezitu montri L! en viaj regionaj aŭ lokaj E-renkontoj. Ni konsciu, ke L! estas unika pro multaj el siaj karakterizoj : ampleksa, enhave tre diversa, regula kaj ĉefe etkosta.

Lige al la gazeto kaj ties adresaro, kiuj jam ebligas interrilatigi legantojn, la fakto, ke de nun gelegantoj povas disponi L!-renkontiĝejon en "Moulin de Beauville", devus akcenti la harmonian, amik-ecan etoson, kiun sentas inter si la gelaŭtuloj.


Almenaŭ deziras tion via al ĉiuj dankema Kribo.

SOMERA RESTADO en "Moulin de BEAUVILLE"

... estas fiksita de la 10-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1989. Estas invitataj gelaŭtuloj, junaj E-istoj, eĉ komencantoj, kaj amikoj de Mondhejmo, ĉirkaŭ la ĉeftemoj "Esperanto kaj Ekologio". Kiel en 1988, partoprenos NIKOLIN'. Nepre notu !

Pliajn informojn vi trovos en venonta L! :

la venonta numero aperos meze de marto



Se tie ĉi estas kruco, tio signifas, ke L! ankoraŭ ne ricevis vian reabonon. Dankon pro la "ordigo" !